

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

Laboro kaj plezuro!

“Dankon kaj gratulojn al ĉiuj, kiuj partoprenis nian regionan ĝeneralan kongreson en la Salono **MASQUELIER** de **Villeneuve d’Ascq**, dimanĉon la 13an de Aprilo.

Ek de la mateno, ĉe 3 tabloj oni cerbumis laŭ 3 temoj: Informado “gvidata” de **Xavier DEWIDHEM**, kiel plibonigi la agadojn de niaj diversaj kluboj (**Katja BOEN**), instruado kaj perspektivoj pri la “novaj lernejaj ritmoj” (**Michel DECHY**). Poste ĉiu grupo prezentis sian laboron al la tuta ĉeestantaro.

La jara agadraporto zorge prezentita de **Katja** kaj la jara financa raporto precize prezentita de **Xavier VILAIN** estis unuanime adoptitaj. Dankego al ili.

Pli ol 40 homoj ĉeestis la honorvinon dum ni akceptis kun granda fiero 4 eminentulojn de la urba konsilantaro, kiuj kutime responsas pri instruado, ekologia urĝo, civitaneco kaj demokratio, sportoj kaj kulturo. Ĉiuj el ili substrekis sian apogon al la venonta infankongreso, kiu devos okazi en **Villeneuve-d’Ascq** dum la U.K. de Lille2015.

Ni ankaŭ havis la plezuron akcepti tutan skipon da volontuloj por organizi

Sekvo p. 2 • • •

Lastaj novaĵoj el la Federacio

Federacia kongreso en Villeneuve-d’Ascq

Al nia ĉi-jara federacia kongreso, kiu okazis la 13an de Aprilo, partoprenis homoj el la tuta Francio, ĉar pro la fakto ke kunveno de la LKK (Loka Kongresa Komitato) okazis en Lillo (en *Lille Grand Palais*, ont kongresejo), la 12an de Aprilo, ni havis la plezuron akcepti tutan skipon da volontuloj.



Post la kutima akcepto-kafo, la renkontiĝo komenciĝis per tri debatoj ĉar la partoprenantoj dividiĝis en tri grupojn: pri informado (niaj retejoj, la Norda Gazeto...), pri instruado (la ebleco agadi venontjare en lernejoj dank’ al la nova organizo de la laborhoraro) kaj pri la eblecoj plibonigi la agadojn en niaj diversaj kluboj. Poste ĉiu grupo prezentis sian laboron al la tuta ĉeestantaro.

Sekvis la tradicia ĝenerala kunveno; la jaraj raportoj – agada, proponita de **Katja BOEN**, kaj financa, precize prezentita de **Xavier VILAIN** – estis unuanime aprobitaj.

Pli ol 40 homoj ĉeestis la honorvinon dum kiu ni akceptis kun granda fiero kvar eminentulojn de la urba konsilantaro, kiuj kutime responsas pri instruado, ekologia urĝo, civitaneco kaj demokratio, sportoj kaj kulturo. Ĉiuj el ili substrekis sian apogon al la venonta infankongreso, kiu okazos en **Villeneuve-d’Ascq** dum la U.K. Lillo 2015.



Post agrabla manĝo en tre amika etoso, **Laurent ZIBELL** kaj **Caroline HUYARD**, du klubanoj el LVE, kiuj iniciatis la ludvesperojn en la Lilla “Café Citoyen”, prezentis la ludon *Brin de Jasette* (Ero de babilado),

la venontan UK-on en Lillo, kiuj renkontiĝis sabaton la 12an de Aprilo en la onta kongresejo "Lille Grand Palais", kaj vespere pluraj gastis ĉe Katja. Post agrabla manĝo en tre amika etoso, Laurent ZIBELL kaj Caroline HUYARD proponis E-an ludon "ero de babilado" por pli bone interkonatiĝi. Kaj estis proponitaj laŭplaĉe vizitoj de 2 muzeoj: ĉu la fama LAM (Muzeo pri Moderna Arto), ĉu klasmuzeo en kiu multaj grizharuloj retrovis sian junaĝon.

Dankegon al ĉiuj, kiuj helpis, por ke tiu tago estu bona memorajo el niaj diversaj agadoj. Ĉu por instali kaj poste reordigi kaj purigi la salonon, ĉu por aĉeti, prepari kaj servi la matenan kafon, la honorvinon kaj la tagmanĝon, ĉu por raportoj aŭ gvidi agadon.

Bonan kuraĝon al ĉiuj, kiuj trapasos kaj trapasigos ekzamenojn. Ĉu la KER-ekzamenoj en Araso, sabaton la 17an de Majo; ĉu la FEI-ekzamenoj en Lillo, sabaton la 21an de Junio. Ni deziras kiel kutime sukceson al ĉiuj kandidatoj! Nia venonta grandega evento estos la semajnfino en Stella-Plage, la 26a Eŭropa Rendevuo majstre organizita de Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, kun bunta kaj belega programo; koncerto de jOmO atendas vin. Nepre memoru la 15an kaj 16an de Novembro. Aliĝu kiel eble plej rapide por la kvieto de la organizantoj.

Kompreneble kelkaj vojaĝemuloj partoprenos la 99an UK-on en Bonaero, kia plezuro sperti vintron dum la somero! //

Michel DECHY



tre interesan ilon por interkonatiĝi kaj instigi homojn al parolado en Esperanto. Pluraj kunsidantaroj vikle ekkonversaciis, sed pro abunda programo multaj partoprenantoj devis rapide foriri al klasmuzeo en kiu multaj grizharuloj retrovis sian junaĝon.



Artemaj homoj kaptis la okazon libere viziti la faman muzeon pri moderna arto, LAM, Lille Métropole Musée d'art moderne d'art contem-

porain et d'art brut.

Dankegon al ĉiuj, kiuj helpis por ke tiu tago estu bona memorajo el niaj diversaj agadoj. Ĉu por instali kaj poste reordigi kaj purigi la salonon, ĉu por aĉeti, prepari kaj servi la matenan kafon, la honorvinon kaj la tagmanĝon, ĉu por raportoj aŭ gvidi agadon.

Reportis Michel DECHY kaj Katja BOEN

La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA KOMITATKUNSIDO DE UFE de la 19-a de Januaro 2014 en Parizo

Okazas tiu UFE-komitatkunsido en "La Ĉerizejo" sidejo de *Esperanto-France* en Parizo.

Kiel kutime nia federacio estas bone reprezentita kun Xavier DEWIDHEM kaj Julia HEDOUX de la UFE-estraro, Michel DECHY prezidanto de GEE, Claude LONGUE-ÉPÉE reprezentanto de la Norda federacio. Diversaj tagorderoj estas prezentitaj el kiuj mi provos fari kelkajn komentojn povantajn koncerni nian federacion.

Administrado kaj financo

– Reviziado de la interna regularo de nia nacia asocio estas pristudata de Xavier DEWIDHEM, kiu proponos ĝin por diskutado kaj komentado fare de la federacioj, okaze de ties membrokunveno.

– La federacioj estas tektaj sendi al Didier LOISON pestojn aperigitajn en siaj lokaj ĵurnaloj.

– Ŝajnas, ke ne estas multaj novaj UFE-membroj en nia federacio!... Ne plu estas sendita al tiuj UFE-novuloj la antaŭa informo "Livret d'Accueil". Tiu libreto estas aktualigota por denova sendado al novaj UFE-membroj.

– Kiel ni jam analizis, la nova sistemo de komuna kotizo "UFE – Federacio – Loka Grupo", proponita de UFE, ne bone adaptiĝas al niaj nunaj

nordfederaciaj kaj nordgrupaj kotizoj. Sed ĝi ebligis en sep nordaj grupoj, kiuj alprenis ĝin, la venon de 80 novaj UFE-membroj. Ni reekzamenu tiun problemon okaze de niaj venontaj komitatkunsidoj kaj ĝeneralaj membrokunveno.

– La ne-UFE-membroj povas eniri en la retliston "UFE-anoncoj" por legi ĝin; sed ili ne povas aperigi siajn anoncojn.

Projektoj

– Estas pridebatite pri Agadplano, proponita laŭ skemo kaj principoj alprenitaj de UEA.

– Pri Eŭropaj projektoj nove proponitaj (aparte "Erasmus+") neniu pretas laboradi.

– Estas antaŭviditaj staĝoj en Bourges, por trejnado de ĉiĉeronoj kaj interpretistoj. Sin konatigu niaj federaciaj eventualaj interesataj por "Lille2015".

– Kampanjo de informado pri la rolo de Esperanto dum la "Granda Milito 14–18". Por informi okaze de lokaj manifestacioj pri tiu temo, estos eldonitaj afiŝoj memorigantaj pri:

- Agado de UEA en Ĝenevo por korespondado inter fremdaj nacioj kaj kun regionoj militinviditaj;
- Kursoj de Esperanto en militkaptitejoj;
- Transporto de infanoj post la milito de Aŭstrio al Hispanio;

• Notoj en Esperanto al la germanaj soldatoj. *Guy CAMY*, sub kontrolo de *Christan LAVARENNE* kiu funde studis la problemon, zorgos pri la verkado, la eldonado, la sendado de tiaj afiŝoj.

• Monhelpi al junuloj.

Instruado kaj ekzamenoj

- FEI konfirmas, ke eblas nun trapasi iunivelan FEI-ekzamenon, ne trapasinte la pli antaŭan nivelon. Sama regulo estas por la KER-ekzamenoj.
- En 2013 estis FEI-ekzamenoj nur en 4 lokoj (inkluzive de Lillo). En unu loko estis nur du kandidatoj!...
- Necesas en nia federacio:
 - Plidensigi la nombron de kursoj;
 - Reklami por trapaso de FEI-ekzamenoj.

Eksteraj rilatoj

Informado kaj komunikado

- Estas preparata planprojekto por onta teamo de UFE por gazetara komunikado. Rilati kun *Didier LOISON*.
- Listo estas konigita de jam planitaj prelegturneoj.
- Niaj partoprenoj estas konfirmitaj en “*Expolangue 2014*” kaj en “*Fête de l’Humanité*”.

Redaktis *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Kongresoj

- Estas eble rilati kun “*Espéranto-France*”, por havi klarigojn pri:
 - Landa kongreso 2014 en *Chambéry*;
 - Universala kongreso en 2015 en Lillo;
 - Pri tiu “*Lille2015*” *Xavier DEWIDE-HEM* donos pliajn klarigojn en ĉi-tiu Junia numero de nia “*Norda Gazeto*”. Estas jam farita listo de volontuloj por helpi dum la kongreso. Interesatoj sin konatigu al *Xavier* aŭ al *Julia HEDOUX*.

Interasocia kunlaboro

- Estis kreita “Eŭropa komisiono de UEA”, por kunordigi la agadojn de Eŭropaj landaj asocioj. Interalie por helpi al malfortaj landoj rilate al Esperanto. Tiurilate Francio povus helpi al Rumanio, por:
 - Starigi retejon;

ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Federacia kongreso en Villeneuve-d’Ascq	p1
Fede ★ Komitatkunsido de UFE de la 19-a de Januaro 2014	p2
E080 ★ Enkonduko al la agad-raporto el Amieno	p3
E080 ★ Agad-raporto el Amieno	p4
E080 ★ Omaĝo al Daniel DEVIS	p4
E080 ★ Kunveno de la 20a de Majo 2014	p4
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p5
BuE ★ Agad-raporto el Bulonjo	p5
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p6
LVE ★ Agadraporto el LVE	p6
LVE ★ Nia Samideano Miguel, de Kubo, turneis en Lillo	p7
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p8
VaE ★ Jacques SALY	p8

El Amieno

Enkonduko al la agad-raporto el Amieno



Malĝoja novaĵo

Vi malkovros tuj post tiu enkonduko la lastan artikolon verkitan de *Daniel DEVIS* por la Norda Gazeto. Bedaŭrinde, *Daniel* abrupte forpasis dimanĉon la 11an de Majo 2014 en Amiena malsanulejo.

La neatendita malapero de *Daniel* estis por ĉiuj membroj de Esperanto 80 kaj ĉiuj liaj Esperantaj amikoj (krom ankaŭ por liaj familio kaj amikoj) gravega kaj malgaja bato.

Kvankam li estis malsana jam de kelka tempo, li senĉese agadis por Esperanto tra gvidado de ĉiuj kursoj, de kunvenoj kaj kunordigado de nia asocio.

Post la artikolo de *Daniel*, vi povos

legi mesaĝon verkitan de *Bernadette MANIER*, kiun ŝi legis por la grupo dum la funebra ceremonio vendredon la 16an. Por akompani la tekston, mi elektis kelkajn fotojn de *Daniel* el mia kolekto.

Poste mi precizigos aliajn punktojn, kiuj ne aperas en la raporto de *Daniel*, sed kiuj tamen estas gravaj.

La Amiena parto finiĝas per resumo de raporto pri kunveno disvolviĝinta la 20an de Majo. Tiun kunvenon la membroj de **Esperanto 80** starigis por kune elekti la tujan estonton kaj funkciigon de la asocio.

Redaktis *Cyrille DÉCOUTURE*

Agad-raporto el Amieno

Kursoj

- Ĉiulunde de la 15a30 ĝis la 17a: 2 lernantoj je nivelo komenco de Bek2.
- Ĉiumarde de la 10a15 ĝis la 12a: 3 lernantoj je nivelo Bek4.
- Ĉiumarde de la 14a30 ĝis la 16a: 4 personoj – grupo laboranta per Esperanto (tradukado, pridiskutado, redaktado...).
- Ĉiŝaŭde de la 15a30 ĝis la 17a: 6 lernantoj je nivelo Bek 4.

Amika kunveno

Sabaton la 2an de Februaro: ni estis 14. Ni multe kantis Esperante programon pretigitan de *Luc* kaj *Françoise Jaïsson*.

Ni ankaŭ legis kelkajn ridigajn tekstojn, rakontis fabelon kaj manĝetis kukojn kun kafo aŭ teo en tute agrabla etoso.

Prelegturneo

La 26an, 27an kaj 28an de Marto, ni akceptis paron da taĝikoj. Dum ilia restado, ĉiu lerno-grupo organizis kaj gvidis parton el vizito de nia bela urbo.

La 27an vespere okazis prelego de niaj gastoj pri sia lando, kun traduko al la franca. Malfeliĉe venis nur tri neesperantistoj.

Kun niaj eksterlandaj samideanoj okazis du komunaj manĝoj de kun-

portitaĵoj, kiuj ebligis al ni esti pli proksime de ili ol dum prelego.

Redaktis *Daniel DEVIS*

Agad-raporto el Amieno: kromaj infomajoj

Antaŭ la malapero de *Daniel*, la asocio registrigis la novajn statutojn de **Esperanto 80** ĉe la asociara servo de la prefektejo.

Ekde la komenco de Marto, **Esperanto 80** funkcias laŭ leĝe agnoskita komunuma formo kaj estas prezidata de naŭ kunprezidantoj.

Redaktis *Cyrille DÉCOUTURE*

El Amieno

Omaĝo al *Daniel DEVIS*

La 16-an de Majo 2014, en la tombejo "La Madeleine" (AMIENO).

1



2



3



4

Ĉiuj, kiuj konis *Danielon*, scias, ke Esperanto estis pasio por li!

Li ŝatis tiun lingvon naskantan pacon, komunikeblon kaj renkontojn; tiun lingvon simplan, logikan, precizan, ebligantan ĉiajn nuancojn, kaj tiom efikan por pritrakti iun ajn temon.

Senĉese li strebis apud plenkreskuloj kaj infanoj por ĝia disvastigo. Multe da energio kaj tempo li dediĉis al ĝi. Pere de ludaj atelieroj li incis junajn gimnaziojn.

Krome li regule instruadis, gvidante kiel eble multe da kursoj.

Li prizorgis interkonatiĝojn: li venigis, gastigis kaj interkonatigis fremdajn esperantistojn, kiuj travojaĝis nian regionon.

Li estus ŝatinta – ni certas pri tio – ke nia memoro pri li estu ligita al Esperanto.

Daniel, ofte danke al via perado ni saltis la paŝon al malkovro kaj lernado de Esperanto. Eĉ en freŝdata tempo, dum via farto malboniĝis, vi daŭre ĉeestis por gvidadi kursojn en afabla etoso.

Dankon pro tiu kune travivita tempo!

Kaj jen por vi lastaj paroloj tradukitaj, por ke ankoraŭ hodiaŭ Esperanto akompanu vin [sekva parto estis legita en Esperanto kaj tradukita francen]:

Ofte, pere de vi, ni pasas el malkovro al lernado de Esperanto.

Eĉ dum la lastaj tempoj, kiam via sano malboniĝis, ĉiam,

en afabla etoso, vi ĉeestis por partopreni la kursojn.

Multe da dankoj al vi pro tiu tempo, kiun ni kune travivis.

Por ĉiam, ni amike salutas vin.

Ĝis revido!

Je la nomo de la grupo "Espéranto 80", verkis *Bernadette MANIER*

Tradukis *Vincent COUROUBLE*

1/ Kun *Maryse* kaj *Albert* en *Morbecque*.

2/ Dum socia forumo en Amieno.

3/ Antaŭ butikoj de pup-faristo en Amieno.

4/ Grimacanta dum **Gasta kunveno** en la ĉambro "La tilioj" en Saluëlo.

El Amieno

Kunveno de la 20a de Majo 2014

Organizado de Esperanto 80 depost la forpaso de *Daniel DEVIS*

La membroj de la grupo Esperanto 80 reprenas la torĉon lasitan de *Daniel*.

La ĉefaj temoj estis tiuj :

Pri la turneo de Kubano Miguel Ángel GONZÁLEZ ALFONSO de la 6a ĝis la 12a de Junio 2014

Jam estis tute planita la vizito de *Miguel Ángel* en Amieno ĵus antaŭ la forpaso de *Daniel*.

Anstataŭ *Daniel*, *Bernadette MANIER* klopodos pri la interŝanĝoj kun *Yves NICOLAS* kaj aliaj respondeculoj pri la turneo.

La kursoj

Daniel gvidis ĉiujn kursojn. Pro tio estis grave renkontiĝi por decidi pri ilia daŭrigo.

Estis decidite, ke ekde nun, ĉiu grupo mem klopodos viviĝi la propran kurson laŭ komuna decido.

- En la 1a grupo, *Jean-Louis GRÉAU* kaj *Henri BON* duope gvidos la kurson por la plej novaj lernantoj.

- En la 2a grupo, la kursoj okazos kiel kutime je la sama horo. La hejma loko ŝanĝiĝos laŭmonate.

- En la 3a grupo (la plej altnivela), la kursoj plu okazos en la domo de *Daniel* kaj *Maryse* je la sama horo.

La grupoj opinias utila la superrigardon de eksterkursaj membroj kiel *Cyrille DÉCOUTURE*, *Jean-Claude ROY* kaj eble *Günter WIESSLAND*. Ili planas superrigardanton po unu por ĉiu kurso.

Krome, estas tri novaj kandidatoj por lernado de Esperanto en Amieno.

Lastinforme, estis alprenita neniu decido pri novuloj.*

*Tamen rete ekfloris ideo pri perreta instruado (kursoj laŭ Dek Leciona Kurso-metodo aŭ per Skype...).

Resume redaktis *Cyrille DÉCOUTURE* laŭ raporto de *Bernadette MANIER*


El Araso


Agad-raporto el Araso (Majo 2014)


Post longa paŭzo, mi reprenas la torĉon de mia amiko *Jean HENNEBERT*, kiu majstre verkis tiun rubrikon dum pluraj jaroj. Li ankaŭ dediĉis multajn horojn al instruado de nia kara lingvo en *Nœux-les-Mines* kaj en *Arras*, starigis kaj nutris la belegan retejon de nia klubo, regalis nin per neforgeseblaj artikoloj plenaj je verda humuro. Grandioza laboro dum pli ol dek jaroj! Nun li volas iom ripozi, ni plene respektas kaj komprenas lian decidon. Koran dankon *Jean*.


Edmond PLUTNIAK

alterne la kursojn *Marianne DUNLOP*, *Alette* kaj *Edmond PLUTNIAK*.


 Kelkaj membroj partoprenas en *Café des langues* en *Lens*.

 Ekde **Januaro 10** membroj partoprenas entuziasme en la Esperanto-Sumoo.


 **5** membroj partoprenis la Federacian kongreson en *Villeneuve-d'Ascq*.

 La **1an de Majo** okazis la kutima kaj sukcesa *Salon du Livre d'Expression Populaire* en *Arras*. Nian Esperanto-budon vizitis multaj

personoj. *Guy CAVALIER*, prezidanto de SAT-Amikaro, deĵoris kun ni kaj prezentis belan libro-servon.

 La **17-an de Majo**, por la tria fojo, *Arras* estos unu el la urboj en kiuj okazos la KER-ekzamenoj.

11 kandidatoj (el *Arras*, *Amiens*, *Lille-Villeneuve* kaj *Dunkerque*) provos sukcesi kaj akiri la prestiĝan diplomon.

 La **24-an de Majo**, nia asocio havos budon en la 1-a Festivalo de lingvoj en *Béthune*.

Raportis Edmond PLUTNIAK

 **Average 15** membroj kunvenas ĉiulunde vespere. Gvidas

El Bulonjo-ĉe-Mar

Agad-raporto el Bulonjo-ĉe-Mar

Jane kaj *Maryse* vizitis Grezijonon. Krom progreso en la lingvo, ili spertis "*La Vie de Château*" kaj ĝuis "*La Douceur Angevine*".


Kiel kutime, ni kunvenas ĉiumerkrede. **Kelkfoje kiam la suno brilas...** ni iras al *Wimereux* trinki teon sur la digo...

Raportis Marie-Jeanne LINE



Agad-raporto el Dunkirko

 **La 15an de Marto 2014**, *Xavier VILAIN* partoprenis en la kunveno de la Federacia Komitato (*Esperanto-Nord*), en Lillo (*MRES*).


 **Sabaton la 22an de Marto 2014**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigis budon en la 10a Salono pri la Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, proponita de "*Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois (ADLLD)*". Ĉirkaŭ 1500 vizitantoj povis ekkoni la agadojn de la klubo.


La 26an de Marto 2014, nia asocio  havigis dokumentojn pri


Esperanto kaj ankaŭ pri nia movado al la hortikultura liceo de Dunkirko, kiu akceptis triafoje la "*Journées régionales de la coopération internationale*" (regionaj tagoj pri internacia kunlaborado).


Tiuj regionaj tagoj reliefigis la kunlaboradajn agadojn kondukatajn de la agrikulturaj lernejoj de la regiono.

Tiel, 90 gejunuloj venintaj de 13 lernejoj povis plibonigi siajn sciojn pri Esperanto.

 **La 13an de Aprilo**, du klubanoj partoprenis la kongreson de la Federacio *Esperanto-Nord* en *Ville-neuve-d'Ascq* (59).

 **Merkredon la 25an de Junio** okazos la 22-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo "*Brossolette*".


 **La 17an de Septembro** okazos la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*.


Merkredon la 24an de Septembro  rekomenciĝos la Esperanto-kursoj (dufoje monate).

Raportis *Gilbert ODDOUX* kaj *Xavier VILAIN*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Agad-raporto el LVE


 **Ĉiunonataj renkontoj**
Ĉiun trian jaŭdon de la monato (krom Julie kaj Aŭguste) je la 18h30 en la Tenisa Klubo FOS en *Villeneuve-d'Ascq*.


 **Ĉiusemajnaj Kursoj**
Bersée: ĉiun lundon de la 18h10 ĝis la 19h45, supera kurso por 5 progresantoj, kiuj eklernis lastajn jarojn; kaj marde je la sama horo por 2 komencantoj. [Instruisto *Claude LONGUE-ÉPÉE*].


Lillo: ĉiun mardon, en la Kvartala Domo en la centro de Lillo, post kelkaj semajnoj, je la sama horo por komencantoj (ĉirkaŭ 2 lernantoj); konversacia rondo dufoje monate en la hejmo de Katja (ĉirkaŭ 4 praktikantoj) [Instruisto *Katja BOEN*].
Oignies: konversacia rondo marde, (ĉirkaŭ 3 progresantoj) [Instruisto *Richard SLATSCHKY*].

Universitato Lillo III: ĉiun mardon, je la sama horo por komencantoj kaj komencintoj (ĉirkaŭ 8); kaj ekde Novembro dufoje monate je la

sama horo lunde por progresantoj [Instruisto *Michel DECHY*].


 **Someraj Staĝoj**
De la 7a ĝis la 11a de Julio, de la 18h30 ĝis la 20a: 5 seancoj por malkovri la lingvon. (3)
Same de la 25a ĝis la 29a de Aŭgusto (1), [*M. DECHY*]. Poste, oni esperas, ke kelkaj daŭrigos la lernadon dumjare en la Universitato de Lillo.

 **Universitato pri Libera Tempo**
Almenaŭ 10 foje vendrede matene dum 1h30 por komencantoj kaj sekve por progresantoj (ĉ. 2 + ĉ. 3). [*M. DECHY*].

 **La klubo ĉe Interreto**
www.lve-esperanto.org
Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.

Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu "fama" adreso kies zorgantoj estas *Katja*

BOEN kaj *Xavier DEWIDHEM*.


 **Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto**
Ĉiujare la elementaj lernejoj (*Anatole FRANCE* kaj *Pablo PICASSO*) invitas min. Mi kutime proponas 3 seancojn po 1h30 (prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine ankaŭ japana Sorobano en Esperanto).


Kiel en 2013, kune kun la urbaj asocioj, kiuj zorgas pri instruado en elementaj lernejoj, sama prezentado en lernejo *Toulouse LAUTREC*, tamen ĉifoje mi aldonos 2 pliajn seancojn por prepari la futuron. Plie, nia asocio *LVE* ricevos monhelpon pro tia agado. Denove oni povas ĝoji pri tiu "valorigo"; estas ankoraŭ paŝo por pli oficiala instruado venontan lernojaron, kadre de la "novaj lernejar ritmoj". Tio estas la futuro!

Partoprenante kaj deĵorante en Parizo dum "*Expo langues*" fine de Januaro, mi renkontis *profesorinon* pri *FLE (Français Langue Etrangère)* de la


Universitato Lille III. Ŝi invitis min partopreni en sia kurso, jaŭdon la 3an de Aprilo, por ke mi prezentu Eon al pli malpli 20 studentoj, kiuj aŭskultas min! [Michel DECHY]


 **La 29an de Aprilo**, samideano el Kubo prelegos en la MRES pri "Kubo dum la XXI^a jarcento". Dankegon al *Katja BOEN*, kiu gastigos lin, al *Claude LONGUE-ÉPÉE*, kiu ĉiĉeronos por li en Lillo, al ĉiuj membroj de nia klubo, kiuj partoprenos kun li en la bela promenado okaze de la "Flandraj Ardenoj". Post la prelego estos plezuro manĝi kune en apuda restoracio.

 **La 15an de Aprilo**, mi prelegis en la urbeto "Saint André", pli ol 35 ĉeestantoj, bonega etoso!


 **La 15an de Majo**, mi denove prelegis en la urbo *Roncq*, ĉiam invite de la asocio "Nord Madame" (Asocio nur por virinoj en diversaj urboj de la norda regiono).


Kia plezuro havi tiom da virinaj oreloj, kiuj preskaŭ religie aŭskultas min! Tamen mi devas konfesi ke pro la aĝo, kelkaj el ili misaŭdas min... [Michel DECHY]

 **FEI ekzamenoj en la MRES** Ili okazos sabaton postagmeze la 21an de Junio. Verŝajne estos nur la du unuaj niveloj. Nuntempe, laŭ la novaj reguloj, kandidato povas tuj trapasi la duan gradon.

 **Budoj okaze de diversaj aranĝoj** Foiro pri Asocioj, ĝi okazis la 8an de Septembro en la vastega sporthalo "Palacium" en *Villeneuve-d'Ascq*, de la 10a ĝis la 18a, bonega momento por

reklami kaj varbi! [deĵoris *Xavier DEWIDEHEM*, *Vincent PEIGNIEZ*, *Michel DECHY*].

 **Festivalo pri la Bildstrioj** En *Lys-lès-Lannoy*: la 9an kaj la 10an de Novembro 2014. [Michel DECHY] Dankon al ĉiuj deĵorantoj kaj vizitantoj!

 **Lille2015, Universala Kongreso okazos en Lillo** Vizito, de la 11a ĝis la 13a de Oktobro, de *Clay MAGALHES*, la responsulo pri UK-oj ĉe **UEA**, kiun renkontis *Xavier DEWIDEHEM*, *Michel DECHY* kaj *Julia HEDOUX*. Efika kaj bonega renkonto, en *Lille Grand Palais*, de multaj volontuloj, sabaton la 12an de Aprilo.

Raportis *Michel DECHY*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Nia Samideano Miguel, de Kubo, turneis en Lillo

Tie li prelegis pri sia lando Kubo kaj vizitis la urbon kaj belgiajn najbaraĵojn

La restado de *Miguel* en Lillo komenciĝis per vizito de *La Piscine en Roubaix*, unu el niaj plej famaj muzeoj, sed dimanĉon ni jam estis en Belgio kie kvar LVE-anoj partoprenis en la "Tago de la Flandraj Ardenoj", fierante pri kontribuo al la internacieco de la aranĝo ĉar certe nia Esperanta grupo estis la ununura kun gasto el tiel fora lando! Post promenado en belega naturo, ni kune manĝis kun aliaj grupoj, kaj Nederlanda esperantisto regalis *Miguelon* per kantado de *Guantanamera* en Esperanto. Ne nur la naturo estas riĉa en la regiono: ni postagmeze vizitis

tre interesan muzeon pri romiaj elfosaĵoj. Kiel kutime, *Piet GLORIEUX* majstre tradukis la komentojn de niaj gvidantoj matene kaj postagmeze.



Ni vere bonŝancis, ĉar ni povis organizi tute ne ordinaran viziton de Bruĝo la sekvantan tagon kaj akompanis nin *Michel DECHY*. Imagu: en Bruĝo atendis nin juna

esperantisto, kiu bonega konas sian urbon kaj ŝategas konatiĝi ĝin al samideanoj! *Bart DEMEYER*, nia ĉiĉerono, pretigis por nia grupeto kvar plej taŭgajn biciklojn kaj sub suna ĉielo ni kvinope ekbiciklis, haltante ĉe la plej interesaj vidindaĵoj kie *Bart* komentis la historion kaj artajn specifajojn de la urbo. Brila tago!

Eble Lillo ne estas tiom alloga kiom Bruĝo, sed ankaŭ tie nin gvidis plej klera ĉiĉerono: nia amiko *Claude LONGUE-EPEE*. Jam temis pri la lasta vizito de la restado. Tiun lastan vesperon okazis la prelego de *Miguel*.

Post akcepto de la ĉeestantoj (kun granda plezuro ni bonvenigis *Piet GLORIEUX* kaj *Lucrèce DECOSTERE* el la Kortrejka klubo) en agrabla muzika etoso, *Miguel* komencis la prelegon per kelkaj geografiaj nocioj kaj ni spektis kolorriĉan filmon pri Kubo. *Miguel* klarigis ke en la lando estas



krizo, sed kiam de la infanaĝo oni vivas en tia kriza situacio, oni ne vere konscias pri tio. Elirinte el la lando, la vojaĝanto ekkonscias pri mankoj en la propra lando...



Miguel rakontis ke Fidel (Kubanoj ĉiam nomis la *líder máximo* per lia persona nomo) donis grandan impulson al la lando, organizante bonan edukistemon, sansistemon, egalecon inter viroj kaj virinoj, inter blankuloj kaj nigruloj, lukton kontraŭ malsato... Sed poste li malfacile transiris al aliaj problemoj. Lia frato Raúl, kiu estras Kubon de sep jaroj,

faris multe da ŝanĝoj, sed kompreneble, li ne povas ĉion plibonigi, kaj la lando estis en malfacila stato kiam li komencis mastrumi ĝin.

Grava fonto de enspezo por Kubo estas la turistoj. En 2013, preskaŭ tri milionoj da turistoj vizitis Kubon. Per tiu mono Raúl riparigis multe da domoj kaj plifaciligis la vivon de la popolo.

Ĝis nun regas en Kubo iom komplika monsisistemo: ekzistas normalaj Kubaj pesoj (ili valoras iom malpli ol unu eŭro). La minimuma salajro estas 250 pesoj. Sed paralele ekzistas aliaj pesoj: la "*Peso Convertible Cubano*", fonetike "*kuk*". Per tiuj oni povas aĉeti multe pli da diversaj kaj pli bonkvalitaj varoj. La kuk-ojn uzas ĉefe turistoj kaj Kubanoj kun familianoj eksterlande... Ĉiuj rajtas aĉeti tiujn kuk-ojn, sed oni bezonas tri por aĉeti botelon da oleo, kaj ĉiu kuk valoras 25 pesojn. La Kuba registaro tre baldaŭ ŝanĝos la monsisistemon kaj


restos nur unu monunujo. Ĉiu familio en Kubo havas specifan kajeron per kiu ĝi povas aĉeti malmultekoste bazajn nutraĵojn, sed nur laŭ malgrandaj kvantoj.

La blokado de la insulo plu ludas gravan kaj bedaŭrindan rolon en la vivo de la popolo. Sed Raúl subskribis gravan komercan kontrakton kun Eŭropo; kaj Usono pli kaj pli solas en sia defendo de la blokado. Fortan influon en Usono havas milionuloj, kiuj antaŭe loĝis en Kubo kaj nuntempe loĝas en Florido.


La prelego de Miguel finiĝis per respondoj al diversaj demandoj, kaj per amuza lotumado de cigaroj, kun abunda fotado ĉiuflanke. Miguel konatiĝis kun Xavier DEWIDHEM kaj estis kontenta paroli pri la UK en Lillo, kiun li esperas ĉeesti. Manĝo en apuda restoracio konkludis la vesperon en amika kaj ĝoja etoso.

Raportis Katja BOEN

El Valenciano Agad-raporto el Valenciano

 De la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro, Lucie MAZURKIEWICZ feris en Nördlingen, ĉarma urbeto de Germanio, okaze de la 30a IF, Internacia Festivalo kiu allogis 116 samideanojn el 23 landoj.

 La 14an de Aprilo, kvar membroj de nia grupo, Jean DIETRICH, Lucie MAZURKIEWICZ kaj Gesinjoroj LENNE partoprenis en la Nordfederacia Kongreso en Villeneuve-d'Ascq.

 La 37a jara renkontiĝo de la grupoj Valenciennes kaj Solresur-Sambre okazis sabaton la 7an de Junio en Coulsolre (inter Maubeuge kaj Beaumont).
Raportas Jean-Marc FRATARD

El Valenciano Jacques SALY

Estas iel memkompreneble, ke Jacques SALY estis la unua el la Valencienanoj iĝanta "Roma". Lia patro estis italo, devenanta de Florenco. Vilaĝa violonisto, li instaligis en Valenciano, kie li edzinigis fraŭlinon JARDEZ, kiu donis al li kvin infanojn, el kiuj tri pluvivis.

Jacques-François-Joseph naskiĝis la 20an de Junio 1717. En sia naŭa jaro li eniris kiel metilernanto en la

atelieron de la Majstro Antoine GILLIS, sed li poste ricevis sian instruon ĉe la skulptisto Antoine PATER. Protektate de la familio La Live de Bellegarde, li foriris al Parizo ĉirkaŭ 1735 kaj laboras sub la gvidado de Guillaume COUSTOU.

En 1737 li atingas la duan "Grand-premion" de la Reĝa Akademio, kaj sekvantjare la unuan Grandpremion por sia bareliefo "David prezentata al

Saül". Tiuepoke, la restado en Romo ne estas rajto, sed favoro prefere atribuita al la Unua Grandpremiulo: SALY profitis de tio.

Antaŭ sia foriro li iras en Valencienon, kie li realigas la buston de sia eksmastro Antoine PATER, kiun oni povas vidi ĉe la urba muzeo. Li ankaŭ inaŭguras la serion de la triumfaj akceptoj de la "Rompremiitoj" en la "Norda Ateno"... La 3an de Oktobro

1740 li eniras en la Frančan Akademion en Romo, sub la gvidado de **DE TROY**. Li ne estas taskita fari, laŭ sia deziro, marmoran kopion de la "Sanktulino *Bibianne*" de la barokulo **BERNIN**; lia sendo el Romo konsistos el kopio de "*l'Antinüs*", freŝe instalita ĉe Kapitolo: belega kopio, kiu povas, laŭ **DE TROY**, esti samranga kiel la originalaĵo.

Inter aliaj laboraĵoj, li raportas el Romo: modelon de Elefanto, elfaritan en Napolo; sian faman sinsekvon de vazoj akvaforde gravuritaj kaj perfekte reprezentantaj la stilon "*Rocaille*" verkitan de **SALY**; kaj multajn desegnaĵojn kaj karikaturojn, kiuj estos gravuritaj far *La Live de Jully*. Antaŭ sia reiro en Francion, en 1748, li organizas memorindan kavalkadon laŭoriente maskovestitan kun sia amiko, la arkitekto **Nicolas JARDIN**, kiu sekvos lin en Danlandon kaj ne plu forlasos lin ĝis

sia morto. En Majo 1749 li estas akceptita en Valencieno. Li sin engaĝigas skulpti, senpage el marmoro, statuon de Ludoviko la XVa por la placo de sia naskiĝa urbo. Ĝi estis inaŭgurita en 1752 (bedaŭrinde detruita kvardek jarojn poste). La 27an de Junio 1750, **SALY** estas favore akceptita ĉe la Reĝa Akademio kun la modelo de sia "*Faune au chevreau*". Nomumite "asistanto al profesoro" en la Akademio en 1752, li realigas por la Markizino **DE POMPADOUR** iun "*Hébés*"-on, diinon de la junaĝeco, kiu konos tre grandan popularecon pere de multaj replikoj aŭ reduktaj.

Sed estas en Danlando, ekde 1753, ke **SALY** disvolvos la esencon de sia talento, sub la ordonoj de la Reĝo Frederiko la kvina, de kiu li realigas la bronzan rajdan statuon kaj kiu superŝutas lin per honoroj. Tiel same multe da verkoj de **SALY** troviĝas

malproksimaj de lia devena patrujo, kie ili povus montri la kvaliton de lia arto. Nobeligiten en Decembro 1768, "Kavaliro de la Ordeno de Sankta Miĥaelo"; **SALY** revenas en Francion en 1774. Elĉerpita, malsana, li mortas en Parizo la 4an de Majo 1776.

Originale verkita de **Jean-Claude POINSIGNON**
Tradukis **Jean DIETRICH**

Tradukitaĵo de la artikolo de **Jean-Claude POINSIGNON**, aperinta en la libro: "*Hommes célèbres en Hainaut*". *Numero spécial 30^e anniversaire. Octobre 2013. Publication n°470 de l'Association Généalogique FLANDRE-HAINAUT.*

Kun la afabla rajtigo de ties Prezidento S-ino **Maryse BOUDART**, kiun ni tre dankas.

Rakonto de vojaĝo VOJAĜO AL IRANO

Kial Irano?

Mi konis Iranon nur per filmoj kaj muzikoj. Kiujn mi ŝategas.

Fine de 2013, mi eksciis, ke la Irana Esperantista Asocio (**IREA**) organizas sian unuan nacian kongreson (**IREK1**) en Tehrano, fine de Marto 2014. Mi decidis partopreni, opiniante, ke ju pli da diversdevenaj alilandanoj ĉeestos, des pli sukcesa estos la kongreso! Ankaŭ pro scivol-emo, kompreneble.

Post kelkaj retmesaĝoj al la organizantoj, kaj klopodoj faritaj surloke de esperantistino, mi ricevis vizon, aĉetis aviadil-bileton, lernis kelkajn vortojn kaj esprimojn en la persa (*farsi*), kaj ek al Tehrano!

Tehrano

La vastega urbego sterniĝas ĉe la malsupro de la alta montaro (pli ol 4000 m) *Elbourz*.

Kuŝante sur la suda flanko, Tehrano

estas varma kaj seka: la maraj ventoj el la Kaspia Maro, norde de *Elbourz*, alportantaj pluvon, estas haltigataj de la montaro.



Varmeco, sekeco, kaj tre densa trafiko okazigas fortan polucion.

Por eskapi tion, Tehrananoj ofte, precipe vendrede (kiel dimanĉe por ni), veturas al la nordaj kvartaloj por ekskursi kaj pikniki sur la montoj.

Longega orient-okcidenta avenuo duonigas la urbegon laŭ du malsimilaj urboj:

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

★ Vojaĝo al irano	p9
★ Esperanto-Familia Aventuro	p11
★ Kuraciloj kaj kuracadoj de niaj praavo	p12
★ To-morrow Morning (morgaŭ matene)	p14
★ Poemo: Libero	p17
★ La ĵurnalo de <i>Cathy PERONI</i> kaj kompanio (dua parto)	p18
★ Atentigo de la redaktoro	p19
★ Programo 2014 de la Esperanto-kastelo Greziljono	p20

– norda Tehrano, kun modernaj multetaĝaj konstruaĵoj, edukitaj loĝantoj kun okcidentaj vivmanieroj;

– suda Tehrano, kun malnovaj dukvaretaĝaj konstruaĵoj, malriĉa, pia loĝantaro kun tradiciaj vivmanieroj. Bildetoj de la ĉiutaga vivo:

– Ĉiuj virinoj devas surmeti vualon: de la nigra surtuta "ĉadoro" ĝis la plej kolorplena luksa vualo, ĝi laŭleĝe kovru la tutan hararon, sed nun

tio estas malpli strikta. Samtame, en la publikaj lokoj, viroj kaj virinoj ne devas apartiĝi, sed malpermesitaj estas, ekzemple, teneraj gestoj (promeni manon-en-mano, kisetadi, ktp). Ni impulsobeemuloj rapide adaptiĝu!

– Haosa trafiko: veturi per taksio estas interesa sperto! Por piedirantoj, trairi straton aŭ avenuen estas ja danĝera eĉ kiam ruĝas la trafiklumo!

– Tehrananoj estas stratgauloj, scivolemaj, helpemaj, honestaj al alilandanoj. Neniu almozpetas.

– Por ni francoj: vidiĝas neniu hundo, aŭdiĝas neniu bojado! Mi ne scias kial.

Kongreso

Elektita kongresejo estis granda, vasta, iom malnov-stila tamen bela kaj sufiĉe luksa hotelo, en orienta Tehrano.



Entute, centoj da esperantistoj el diversaj partoj de Irano kaj 12 alilandanoj (el Japanio, Koreio, Aŭstralio, Pollando, Francio) partoprenis en tiu unua kongreso de **IREA**. Historia evento: post 42-jara kadukiĝo (1933–1975), sukcese relanĉis la movadon Profesoro *Mohammad Hosein SAHEB-ZAMANI* en 1975. Sed denove Esperanto preskaŭ malaperis en 1982 (milito Irako-Irano). Post la milito, nova vento reŝanĝis la fajron kaj nun la movado viglas kaj la aŭtoritatoj estas neŭtralaj.

Ne necesas precizigi, ke la etoso estis aparte amika, entuziasma, ĝoja, kaj ni alilandanoj estis varmege bonvenigitaj!

La kongreso mem daŭris unu tagon kaj duonon.

Ĝi malfermiĝis per aŭskultado de bele kantataj versoj de la Korano

kaj de la nacia himno. Eble por konformiĝi al la leĝo aŭ al la aŭtoritatoj? (Same, la inaj ĉeestantoj devis plu surhavi kaptukon en la kongresejo.)

Sekvis diversaj salut-mesaĝoj diritaj de gastoj aŭ senditaj de gravuloj.

Poste ni kantis “La Espero” sed nur voĉe (do iom fuŝe!) tamen tutkore: gravas nur la intenco, ĉu ne?

Kaj okazis la Ĝenerala Asembleo de **IREA**: raportoj, voĉdonadoj, rezolucioj.

La programo pluis per amuzigaj skeĉoj far triopo da aktoroj (bedaŭrinde en la persa) kaj tradiciaj muzikoj far diversaj grupoj.

La sekvantan tagon, ni aŭskultis prelegojn diverstemajn.

Aparte interesa estis prezentado far altnivela sociologino (flue parolanta Esperanton) pri la evoluo de la viro-virinaj rilatoj depost la revolucio (1979), kio okazigis multe da demandoj...



Ankoraŭ kelkaj kulturaj programeroj antaŭ la tradicia fina komuna foto.

La morgaŭo estis dediĉita al tuttaga ekskurso: ni vizitis la *Golestan* Palacon, (arte riĉegajn konstruaĵojn de la *Qajar* (kajar) dinastio) kaj, posttagmeze, la *Tajrish* (taĵriŝ) bazon. Kaj ĉiuj adiaŭis.

Postkongreso

Tamen kelkaj alilandanoj plu restadis en Tehrano. Kun la helpo de lokaj geesperantistoj kiel ĉiĉeronoj, ni grupete vizitis la *Milad* Turon (kiu estas 425 metrojn alta, simila al tiu en Toronto, sed arkitekture pli bela, laŭ mi...), muzeojn, kaj ekskursis tutan tagon en la montaro (kvankam ni ne havis taŭgajn ŝuojn kaj vestaĵojn) antaŭ fina tradicia (sur tapiŝo) vespermanĝo ĉe gastiganta esperantisto.

Kelkaj rimarkoj por konkludi

• Mi elektis loĝi ĉe esperantistoj, ĉar mi scivolemis pri la loka vivmaniero. Unue en iom kaduka loĝejo de suda kvartalo kun tradicia kaj senkomforta vivmaniero, kio ne ĝenis min. Sed, tiu bonkora afabla gastiganto preskaŭ ne parolis Esperanton! Do rapide ne plu eblas kunvivi, organiziĝi pro tro da miskomprenoj.

Poste en moderna apartamento de norda kvartalo kun okcidenta komforta vivmaniero. Tute malsamaj mondoj! Tute malsamaj spertoj! Sed la plej logika elekto kiam oni vizitas esperantujon...

• Por ni Eŭropanoj kaj ĝenerale por Okcidentanoj, la prezoj estas tre malaltaj: ekzemple, taksio de la flughaveno (35 km okcidente de la urbocentro ĝis la kongresejo en orienta parto de la urbo) kostas 13 eŭrojn; metrobileto (dependas de la distanco) kostas ĉirkaŭ 0,12 eŭro; same pri restoracioj, ktp.

• Nia registaro malkonsilas vojaĝi al Irano (kaj ankaŭ la Irana registaro al Okcidento!): oficiale, niaj landoj ne estas malamikaj, tamen ankaŭ ne amikaj! Kaj petas, esperas ke ni obeu. Sed, kiel ofte, la lokaj loĝantoj estas scivolemaj (multaj, aŭdante nian komunan lingvon, faris demandojn – okazigante tujan varbadon far la iranaj esperantistoj), helpemaj, kaj honestaj (almenaŭ en mia mallonga sperto!) al la alilandanoj.

• Vizitonte/ante fremdan landon, ni lernu kelkajn bazajn vortojn kaj esprimojn en la loka lingvo: la alparolotoj ŝategas!

Ĉu re-iri Iranon?

Jes ja! Certe, en ĉi tia aventuro, ni spertas ne nur bonajn travivaĵojn. Sed restas la samaj kialoj (scivolemo por tiu multjarcenta civilizacio, apogo al la loka Esperanto-movado) kaj la forta deziro plu daŭrigi la komenciĝintajn amikecajn rilatojn. Esperanto estas eksterordinara komunikilo por konatiĝi kun aliaj homoj, do ni esperantistoj vojaĝu al tiaj fremdaj landoj!

Verkis *Guy PERRIN*

Rakonto de amiko

Esperanto-Familia Aventuro

Tiu aventuro komenciĝas dum la unua mondmilito, verdire longtempe antaŭ mia naskiĝo.

En 1914, mia avo estas dekokjara volontulo, kiam li soldatiĝas en la Francia armeo, por “savi” sian landon. Tiuepoke, li estas idealista junulo, sed rapide lia vivo iĝas abomena premsonĝo. Tagojn post tagoj, monatojn post monatoj, ĉiam li travivas terurajn batalojn en la tranĉeoj ŝlimoplenaj. Feliĉe, kelkfoje, li sukcesas kaŝe alproksimiĝi al rivereto, kie li ŝatas resti sola en tiu eta “oazo”, kiun la obusoj ankoraŭ ne detruis.

Kia angora surprizo, kiam li renkontas tie germanan soldaton! Tuj la malamika soldato provas paroli kun li, sed sen sukceso. Kelkajn tagojn poste, la germano denove montriĝas kaj donas librojn al mia avo.

Mi supozas, ke temis pri vortaro kaj gramatiko pri la germana lingvo.

Mia avo, kiu nepre volas komuniki, ekkomencas lerni mem la germanan. Iom post iom, li balbutas kelkajn vortojn. Li komprenas, ke, same kiel li, la “malamikoj” esperas, ke tiu aĉa milito baldaŭ finiĝos. Ambaŭ ili ne plu kapablas elteni tiun abomenan situacion.

En 1917, sur la “*Chemin des Dames*”, la germanoj perforte ekokupas la tranĉeon, kie mia avo kaj liaj amikoj atendas la ordonojn de la kapitano. Bonŝance, la germanoj ne pafas, ili nur kaptas la francajn soldatojn, dirante “Vi bonŝancas! Por vi la milito estas finita”. Baldaŭ, piede, ili foriras al Germanio.

En la militkaptitejo, estas multnombraj soldatoj el diversaj landoj. Ili ne povas komuniki inter si, ĉar ili ne parolas la saman lingvon. Iam, viro diras al la soldatoj: “Vi ne povas paroli kune ĉar vi ne komprenas unu la alian. Se vi volas, mi povas instrui al ĉiuj volontuloj, eksterordinaran lingvon, kiu ebligas al vi kompreni unuj la

aliajn”. Kompreneble entuziame, mia avo tuj akceptas lerni tiun lingvon.

Tiamaniere, komenciĝas nia familia aventuro, kiu nomiĝas “Esperanto”.

Post la milito, mia avo edziĝas kaj li instruas Esperanton al ĉiuj siaj samfamilianoj: mia avino, la gebofratoj, mia patro...

Poste, tute logike, li kreas klubon en Tourcoing kaj gvidas kursojn.

Tiuepoke, li korespondas kun esperantistoj el la tuta mondo eĉ el Mongolio. Tiam li havas pli ol cent kvindek plumamikojn.

Iam, kompanie kun mia avineto kaj mia patro, ili partoprenas UK-on en Germanio. Mia patro estas ensorcita, vidante hindon tradicie vestitan, kiu havas turbanon sur la kapo. Lia edzino surhavas belan ruĝan sarion. Tio revigis ankaŭ min.

Mia avo konatiĝas kun multaj esperantistoj, kiuj iĝas liaj geamikoj, interalie *Frantz VANDOMEEL* el Kortrejko, kiu estis gravuristo. Li ofte diras al mia avo: “Se vi volas, kiam via filo estos pli aĝa, mi ŝatus lernigi al li mian metion”. Tiuepoke, mia patro estas juna knabo, ofte li aŭdas pri tio, kaj kiam li estas 14-jara, tute nature li konsentas iri ĉiutage al Kortrejko kiel metilernanto.

Oni povas diri, ke Esperanto influis kaj la metion kaj la vivon de mia patro.

En 1939, mia avo, kiu delonge estis kontraŭmilitulo, ankoraŭfoje estas devige varbita kiel soldato.

Kia granda malespero!

Bonŝance, li ne foriras longtempe; baldaŭ li revenas hejmen. Iam, la germana plumamika esperantisto *Hans* alvenas ĉe miaj geavoj. Tiu viro forfuĝis piede el Germanio. Eble li estis judo, mi ne scias. Mia avo kaŝas lin dum kelkaj tagoj, sed *Hans* volas daŭrigi la marŝadon. Mia avo donas al li ŝuojn por anstataŭigi liajn eluzitajn.

Mia avo konsilas al li foriri suden, sed Hans nepre volas vojaĝi al Nederlando, kie loĝas geamikoj. Krome li ne parolas la francan... Ni neniam plu aŭdis pri li... Kio okazis al li?

Post la milito, ofte mia avineto montras al mi, knabineto, siajn trezorojn: poŝtkartojn el la tuta mondo, ĉefe el Japanio, ankaŭ delikatajn silkaĵojn, brodaĵojn... Vidante tiujn mirindaĵojn, mi revas...

En 1949, Paĉjo aĉetas malnovan aŭton, kiu ebligas al ni viziti la esperantistajn amikojn. Ofte ni veturas al Kortrejko, Gento...

En 1952, ni vojaĝas tra Vogezoj kaj Elzaco pere de Esperanta movado: la asocio “Naturamikoj”. Ĉiutage, ni vizitas la regionon kaj vespere ni loĝas en alia dometo. Eksterordinara vojaĝo bazita sur plena fido. Ĉio en la dometo estas je nia dispono tute libere. Ni devas nur meti iom da mono en specifan skatolon, la lastan tagon, ordigi la dometon kaj redoni la ŝlosilon al najbara responsulo.

Pasas la tempo: lernejo, geedziĝo, infanoj; dume mi forgesas Esperanton. Tiuepoke, mia avo loĝas ĉe miaj gepatroj; denove mi ne profitas la okazon por paroli kun li pri lia pasio, “LA” lingvo, ĉar mi opinias, ke nur li estas kapabla paroli tiun miraklan lingvon!

Iam *Richard*, mia edzo, akompanas mian avon al ekzpozicio pri Esperanto en la urbodomo de *Tourcoing*. Mia avo aĉetas librojn kaj, denove, li multe legas Esperante. Sed ni ne profitas la okazon, por interesiĝi pri Esperanto, por paroli pri ĝi kun mia avo.

Mi tiel admiras mian avon, tiun viron, kiu faris eksterordinarajn aferojn, kiu konis homojn en la tuta mondo... Ne! Esperanto ne estas por mi. Mi ne estas sufiĉe inteligenta! Tio estas por “eminentuloj”...

En 1992, pro eksproprietigo, ni

devas translokiĝi. Ni decidis konstrui domon en kampara regiono; kaj ennestiĝas en *Bersée*.

Miraklo!! *Bersée* posedas Esperanto-klubon. Fine de Decembro ni renkontas *Claude LONGUE-ÉPÉE*, la kursgvidanton, kiu proponas al ni partopreni sian kurson. Tuj, ambaŭ ni multe ŝatas tiun lernadon. Ni multe

laboras. Marte ni partoprenas la federacian kongreson en *Bersée* kaj Julie la UK-on en *Montpeliero*, kie ni parolas kun japaninoj, finnoj, poloj, Brazilanoj... tute libere kaj facile. Ni eĉ diskutas kun tagikino, Kubanoj...

Lerni Esperanton estis por mi iamaniere omaĝi al mia avo kaj samtempe realigi propran deziron.

Finfine, tiu eksproprieto, kiu estis por ni premsonĝo, ebligis al mi realigi mian revon, kiu ŝajnis al mi neatingebla, ĉar Esperanto estas ĉies lingvo, ne nur tiu de eminentuloj. Dankon *Claude*.

Verkis France VALET

Medicino Kuraciloj kaj kuracadoj de niaj praavoj

Enkonduko de

Claude LONGUE-ÉPÉE

Mi gvidas kursojn de Esperanto en mia vilaĝo *Bersée*.

En *Bersée* mi naskiĝis antaŭ 82 jaroj. En *Bersée*, antaŭ 72 jaroj, mi estis lernanto en elementa lernejo de *Paule LERNOULD*, kapabla instruistino apenaŭ dek jarojn pli maljuna ol mi.

En *Bersée*, jam je la komenciĝo de la 20-a jarcento vivis du aktivaj geesperantistoj. Tie de tiam restadis, preskaŭ ĉiam seninterrompe, esperantistoj.

Tie nun estas kvin aktivaj esperantistoj kaj sep esperantoparolantaj kursanoj. En tiu vilaĝo de 2000 loĝantoj la proporcio de samideanoj situas do inter 0,25% kaj 0,60%, kompare al la monda proporcio inter 0,025% kaj 0,060%. Estas do kompreneble, ke – miaopinie – *Bersée* estas la poluso de Esperantujo. Alia interesa karakterizo de *Bersée* estas, ke aktivas tie iu “Ronda Tablo de Pikardparolantoj”, en kiu mi partoprenas. Ankaŭ en *Bersée* estas iu “Rondo de la memorantoj”, kiu engrupigas dek seson da gemaljunuloj, kiuj verkis artikolojn de siaj memoroj inspiritajn kaj eldonitajn en broŝuro titolita “*Si Bersée m’était conté*”.

Estas en tiu broŝuro pluraj artikoloj en kaj pri la pikarda dialekto kaj tri artikoloj pri Esperanto.

Paule LERNOULD estas unu al la 16 memorantoj (kiel mi!); kaj ŝia ĉisekvanta teksto estas unu el la 73 artikoloj de la broŝuro.



La “Rondo de la memorantoj”



Claude L.-E. kaj *Paule LERNOULD*



Mi konfesu, ke mi ofte devis esplori vortaron por precize traduki specifajn pli malpli teknike medicinajn vortojn...

Mi kontentus, se la teksto povus helpi kursgvidantojn por instrui tiel specifajn vortojn de nia lingvo.

Enkondukis *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Kuraciloj kaj kuracadoj de niaj praavoj

Jen estas kelkaj kuracadoj kaj kuraciloj transkonigitaj de generacio al generacio, kaj uzitaj de niaj praavoj, por priflegi kelkajn negravajn vundojn aŭ malsanojn.

Por kuraci la prispirajn malsanojn La siropoj:

Preparitaj por kvietigi la tusadon de la infanoj.

Oni elkavigis dikan karoton, kiun oni plenis el la kandosukero taŭge pistita; oni lokigis tiun karoton randen de la karbohejtilo, kaj post kelkaj horoj estis ĉerpebla el la karoto bona siropo, kiu mildigis la gorĝon.

Ankaŭ estis eble prepari tasegon da tre varma lakto kun kelkaj gutoj da jodsiropo.

La inhalajoj:

Kaze de kataro aŭ de rinito (klare dirita “*niflette*” laŭ la *chti*-modo) nenio pli taŭgas ol tre varma dekoktajo el timiano verŝita en kuveton; oni enspiris la vaporojn, kun la kapo kaj la vizaĝo kovritaj per tuko. La kuracado, reparate plurfoje dum la tago, ebligis malobstrukci la spirajn kanalojn.

La kataplasmoj:

Multe uzitaj por malkongesti bronkojn kaj pulmojn. Oni preparis densan paston el linfaruno kaj akvo. Oni sternis ĝin varmegan sur tukon, kiun oni faldis kaj metis sur la bruston aŭ la dorson de la malsanulo. Por plia efikeco, oni povis sterni sur la tukon mustardfarunon antaŭ ol

surmeti la linfarunon. Oni tiel ekhavis sinapan kataplasmon pli aktivan. Necesis konservi tiun kataplasmon sur la korpo kiel eble plej longtempe, por ke la sango alfluu la haŭtan nivelon.

La kupoj:

Por flegi la bronkojn kaj la pulmojn, oni surmetis ankaŭ kupojn. Tio estis delikata tasko farenda de spertegaj manoj.

Oni bruligis en la kupo folieton el cigaredpapero aŭ vatpeceton sorbintan alkoholon.

Atentu! Ne varmigi la randojn de la kupo, kiu, metite sur la bruston aŭ la dorson, povus brulvundi!

La haŭto ŝvelis en la kupo, ruĝiĝis, bluiĝis... Post dudek minutoj oni demetis la kupojn per malforta premo sur la haŭto rande de la vitro.

Feliĉe alvenis kuraciloj malpli kruelaj kaj pli praktikaj.

La termogena vato:

Ankoraŭ nun estas memor-eblaj la reklamoj montrantaj grandan diablon kraĉantan fajron kaj premantan sur sia brusto dikan pakajon da oranĝkolora vato: tio estis la fama termogena vato.

Tiu sorba vato, trapenetrante de hispana pipro, iomete malsekigitate kaj metite sur la haŭton, igis alfluan de elkongestiga sango.

La "Rigollot":

Ĝi estis uzebla por anstataŭigi la sinapojn. Ĝi estas paperaĵo surkovrita de mustardfaruno kaj akvumota antaŭ uzo. Ĝi estas praktika, sed ne ridiga... Kvankam inventita de Doktoro *Rigollot*!

Por kuraci

La furunkojn:

Oni nomis ilin ankaŭ "des clous" (= najloj laŭ la *chti*-modo).

Oni uzis kataplasmojn el "por-blankajoj"; tio estis metodo malmulte asepsa, ne sendanĝera.

Sed mi memoras, ke, kiam mi estis infaneto kaj dum mi estis suferanta pro furunkaro, oni surkovris la mal-

sanan surfacon per "nigra sapo"... Kaj la metodo efikis.

La unuagradaj brulvundoj:

Ili estis kuracataj, ĉu per kataplasmo el amelo, ĉu per oleo... Kio estas vigle malkonsilita nuntempe.

Bonŝance, ni konis en la vilaĝo personon, kiu posedis la kapablon, ne resanigi brulvundon, sed forigi la doloron... Onidire, tiu persono estus transdoninta sian sekreton...

Eblas esti nekredema, sed du personoj el mia familio bonefike spertis tion.

La tranĉvundetoj, la skrapvundoj:

Por ilin kuraci en mia familio ni iris konsulti nian najbarinon *Marie PENNEQUIN*.

Ŝi konservis petalojn de blankaj lilioj



en alkoholo; ŝi metis unu aŭ du tiajn petalojn sur la vundon, kaj ŝi ĝin ĉirkaŭigis per pura ĉifono. Post kelkaj tagoj la vundoj cikatriĝis.

Ĉu la kaŭzo estis tutsimple la antisepta efiko de la alkoholo?

La sanga cirkulado:

Ĉu vi kredus tion, se mi sciigus al vi la kuracadon?

La urtikoj! Tamen estas vere!

Mia avino plurfoje dum la jaro gastigis sian kuzinon *Leopoldine*. Ĉiuvespere tiu-ĉi petis, ke mia patro ŝirkolektu por ŝi bukedon da pikegaj urtikoj; kaj en sia ĉambro, antaŭ ol enlitiĝi, ŝi per ili frotadis sian korpon: vere kruela terapio!

Pli facilus kuracadi per "Abbé Soury"! Ankoraŭ nuntempe troveblas tiu kuracilo en apotekoj kaj eĉ estas

reklamado pri ĝi en televido.

Certe estis ankaŭ – kaj cetera ĉiam estas – la hirudoj. Estas tiuj naŭzaj bestetoj, kiuj alkröĉiĝas sur vi, suĉas vian sangon kaj liberigas viajn kongestitajn celulojn. Poste oni ilin malplenigas en telero.

Por pli bona digesto:

Infuzaĵo el sekigitaj kamomilfloroj.

Por laksigi:

Oni kuiras en akvo "poreverdaĵoj", kaj oni trinkas la suknon.

Por faciligi la dormon:

Infuzaĵo el tilifloroj rolas kvietige.

Por la urinaj kanaloj:

Tizano el ĉerizpedunkloj.

Por trinki dumsomere:

Bone freŝigita tizano el folioj de nigra ribo.

Por la zorgoj de la haŭto:

Meti en bankunon ŝtofan saketon entenanant sekigitajn foliojn de sambuko. Konsilite kaze de morbililo por mildigi la jukojn.

Jen kelkaj kuraciloj antaŭe uzataj kaj kiujn mi memoras. Oni utiligis multe da plantoj,

sed tio ne estis panaceo! Ni tamen konstata, ke la plantoterapio relaŭmodiĝas, kvankam la herbarapotekistoj ne plu estras la apotekprofesion; "*ils n'ont plus pignon sur rue*"...

Dum la pasintaj jarcentoj, alvoki kuraciston ne estis tiel ofte kiel nuntempe; oni tiel agis nur okaze de danĝero.

Tial la kuracadoj, kiuj antaŭe montriĝis efikaj, ebligis flegi ne tro malfacile kelkajn etajn "bobos".

Teksto franclingve verkita de **Paule LERNOULD**
Alesperantigita de **Claude LONGUE-ÉPÉE**

To-morrow Morning (morgaŭ matene)



Enkonduko de Roland PLATTEAU

Jen originale frislingva novelo alesperantigita de *Sipke STUIT* (1908-1974), frislanddevena esperantisto, kiu trairis Eŭropon per ĉareto por instrui Esperanton per la rekta metodo. En Araso li enamiĝis kaj edziĝis en 1934 kun unu el siaj lernantinoj, *Simone DECAUDIN*, filino de brutokomercisto, kaj ili estiĝis agrokultivistoj. Ili inter si kompreneble parolis Esperante, kaj la kvin gefiloj iĝis nature denaskaj esperantoparolantoj. La ano

de la Eo-klubo de Araso bone konis unun el ili.

Sipke STUIT partoprenis la regionan Esperanto-movadon. Li konatiĝis interalie kun *Petro STOJAN*.

Mi ĉi-sube tradukis kelkajn paragrafojn de la Vikipediaj artikoloj.

Enkondukis Roland PLATTEAU

Komence la tri fratinoj

PIERSMA esperis, ĉiu por

si, ke ĉio evoluos favore. Po unu viro estis altgrade stranga kaj miriga aperintaĵo en la sekura mondeto de ĉiu el ili, maljunaj fraŭlinoj. Tamen viro, estaĵo honorinda. Eĉ soldato. Kaj ĉi tiuj viroj estis tiel lojalaj, ili tiel fide elkore amis kaj tiel lojale konkeris, ke la espero persistis, ankaŭ kiam ili, unu post la alia, rimarkis, ke ili estas gravedaj. Tiam la soldatoj estis jam for, profunde en Germanio, kie ili havis ankoraŭ farotan taskon, kvankam ne plu temis pri batalo. Sed *Tom*, la sola, kiun ili bone komprenis, ĉar li havis Nederlandan patrinon, estis dirinta, ke ili revenos, kiam tiu tasko estos plenumita. Sed tiam ne plu kiel soldatoj, sed kiel liberaj viroj en libera mondo. "Free men in a free world". Ankoraŭ iom da pacienco...

Nu, la regimento estis malaperinta for en Germanion kaj, laŭmezure ke la inoj vidis sin mem kaj la aliajn ampleksiĝi, fandiĝis la espero. Ŝarĝite de la memoraro, ili rigardis la mondon nun per aliaj okuloj ol tiuj de antaŭe. Hinke, la plej juna, kiu kapablis sufiĉe bone manipuli la plumon, ja skribis al la Kanada Ambasadorejo leteron, en kiu ŝi demandis pri iu *Edward-Peter O'DWEJER* de la tioma

regimento – kun numero kaj ĉio plia. Sed kiam, post duonjaro, alvenis respondo, peza letero plena de stampoj kaj subskriboj kaj enhavanta la informon, ke *Edward-Peter O'DWEJER*, metallaboristo en *Ottawa*, edziĝinta kaj patro de kvar infanoj, kies ĉiuj nomoj estis indikitaj, estis malmobilizita antaŭ duonjaro, tiam la skandalo jam delonge estis disvastiĝinta tra la vilaĝo; kaj la tri idinoj *PIERSMA*, laŭ interspaco de ĉirkaŭ dek kvar tagoj, enmondigis siajn infanojn, kiuj nomiĝis nek *O'DWEJER*, nek *Johnson* aŭ *William*, sed simple *PIERSMA*. *Hinke* naskis eĉ du: tio estis do kvar *PIERSMA*-oj samtempe: du knaboj – la ĝemeloj, kaj du knabinoj.

De tiam la fronto de la *PIERSMA*-familio staris solide kaj nesukleble disde la vilaĝa komunumo, kiu moke ridetis, flustradis kaj klaĉadis plej fervore. Kelkiuj sentis admiron antaŭ la virinoj, kiuj, kune kun la zorgoj de la gepatra farmeto, estis oferintaj sian virgecon kun solenaj vizaĝoj kaj fiera koro. Sed la plejparto parolis pri skandalo kaj peko. Precipe tiuj, kiuj ne sciis kiel la akvo de la peko estis tuŝe proksimiĝinta al la lipoj de iliaj propraj filinoj; kaj tiuj estis multnombraj!... La sorto ŝajne volis, ke la frapoj falu sur la *PIERSMA*-ojn; kaj tio ne estis speciale vera novaĵo

por tiuj, kiuj estis konintaj la maljunan *PIERSMA* kaj ties patron. Tiuj fakte daŭre elportis kaj enkasigis la sortobatojn; kaj tiel sendube estus eterne.

Sed finfine la sensacio formortis. Akceptiĝis kiel fakto, ke la tri filinoj *PIERSMA* ricevis kvar infanojn de Kanadanoj. La infanoj restadis sub la deklive klinita tegmento de la malnova farmeto; aŭ, ĉe bona vetero, en la fruktarba ĝardeno; ĵaluzo protektate kontraŭ la krudaj ventoj de la mondo. Ili grandiĝis kaj faris, ankaŭ sen patroj, kion aliaj infanoj faras: dormi, manĝi, ludi kaj kvereli. Ne estis dubo pri tio, ke la patrinoj serioze konsideras sian taskon. Kaj la infanoj – kvankam unu el ili, tiu de *Gjerritsje*, tre certe havis negran aŭ indianan sangon en siaj vejnoj – estis ĉarmaj infanoj vere montrindaj; kvankam tia monstro malofte okazis.

Fakte la farmeto kontentige prosperis. La komuna ĉagreno kaj la komuna fiero estis forĝintaj konkordon, kian oni ne facile imagas inter virinoj, fratinoj kaj maljunaj fraŭlinoj. Kontakton kun la vilaĝo, escepte de butikistoj, bakistoj kaj ceteraj ĉepordaj vendistoj, ili havis apenaŭ. Jam pasis la periodo, kiam ili - kiel sveltaj, timemaj birdoj, iom perditaj kaj rigidaj - flugetis tra la vilaĝa vivo. Iliaj vizaĝoj, fakte ne malbelaj, sed iom tro plataj kaj longecaj kaj seriozaj, kiel libroj de *BOSBOOM-TOUSSAINT*, estis ricevintaj amaran trajton, ankaŭ ion fierecan, pro kio ili nun eksimilis la patron, kiu ĝis sia morto regis la etan farmon mizere kun ia venĝa sento rilate la mondon, kaj tiam devis lasi ĝin al la zorgoj de la tri apenaŭ plenkreskaj filinoj. Feliĉe, ke *Albert PERSMA* ne plu eksciis tion pri la Kanadanoj, li estis ricevinta sufiĉe da frapoj kaj iom da ripozo li honeste meritis.

lun belan tagon subite okazis io, kion neniu plu atendis. Unu el la Kanad-

anoj revenis, tiu de *Gjerritsje*. Ili apenaŭ rekonis lin. Lia soldata kostumo iam flate tajlis lian korpon; sed nun li aspektis kiel almozulo, kiun oni eĉ ne akceptus por pasigi ununuran nokton en la fojno. Plej grave estis, ke ili ne komprenis lin. *Tom*, tiu de la Nederlanda patrino, estis estinta ilia interpretisto, kiu ĉion fidele tradukis, sed kun ĉi tiu, kiu nomiĝis *Pat*, ili verdire sukcesis interŝanĝi eĉ ne unu vorton. Ili metis panon kun ŝinko antaŭ lian nazon kaj pacience atendis. *Pat* manĝis kaj lasis sin gliti en seĝon. Li, kiel antaŭe, ŝtopis sian pipon el la patra tabakskatolo. Tre klare rekonebla li estis la patro de la infano de *Gjerritsje*, ankaŭ en li estis io negra. La sango ne malkonfesis sin, ĉar kiam la kvar infanoj eniris – iom timemaj antaŭ tiu fremda onklo –, *Pat* spontane levis sian propran idon el inter ili, ĵetis tiun en la aeron, rekaptis ĝin kaj preskaŭ enamiĝis al sia propra ido. Tiam li alrigardis *Gjerritsje*, kiu staris apude kun fajroruĝa koloro; li kun rideto plena de tenereco diris ion kiel “*merry*”⁽¹⁾. Estis stranga vorto en la nuna cirkonstanco kaj neniu komprenis ĝin. “*Father*” kaj “*mother*” li diris kaj, tion dirante, li montris sin mem kaj *Gjerritsje*-on, tio estis jam pli klara. Kaj tiam li prenis ŝian brakon kaj iris kun ŝi en la korton, tien kaj reen. Samtempe li kantis la fianĉinan ĥoron el *Lohengrin*, kiel nur ebria havenlaboristo kapablas fari. Nun ne plu estis dubo. Malfacilis trovi solvon aŭ simplan konsilon...

Ili provis plani ion triope, sed ili ne sukcesis elturniĝi. Ĉu tiu bubo restu ĉi tie? Kiel ili najlus en la kapon de *Pat*, ke li ne estas malbonvena, sed ke tamen li devus surtabligi pli konkretajn pruvojn pri siaj bonintencoj?

Precipe *Hinke* tute ne fidis ĉi tiun ulon. Kiu konfirmus, ke li ne jam edziĝis, same kiel tiu *Edward-Peter*? Kaj sub kia ŝtateco li ŝipvojaĝis?

“Li aspektas kiel almozulo”, diris *Durkje*, la plej aĝa kaj plej silentema el la tri.

Kaj *Hinke* rekte demandis: “Ĉu vi akceptus edziniĝi al li, *Gjert*?”



Ŝi ne respondis. Estis tre klare: ŝi ne forĵetis tiun penson anticipe. Profunde en ŝi la honto plu mordis, pli ol ĉe la aliaj.

“Kion vi farus?” ŝi demandis fine. “Li aspektas tiel malpura”, diris *Durkje*. “Tio povas esti sekvo de la vojaĝo”, indulgemis *Gjerritsje*, “ne estas nenijaĵo de *Genado* ĝis ĉi tie.”

“Li restu kelkajn tagojn”, proponis *Hinke*, “tiam ni denove konsideros.”

Tiel okazis. *Pat* povis resti kaj kiam ili serĉis lin, ili povis lin trovi en la fruktarbejo, kiu estis ludanta kun sia propra infano kaj kun tiuj de la aliaj. Li mem kuŝigis la etan *Gjerritsje* en ŝian liton kaj li kantis Kanadajn kantetojn por ŝi. Kaj post tio li sidis ĉetabla, fumante pipon en malnova, blua kitelo de patro, kaj rakontis. Ili ne multon komprenis, sed estis tamen ia ŝanĝiĝo: viro en la domo, dum jaroj tio ne okazis! Kaj ĉi tiu viro estis simbolo, li reprezentis la tri iamajn virojn, kaj tia li egale proksimis al ĉiuj tri virinoj. Fakte, kiel li sidis tie kun rideto sur sia vizaĝo, kvazaŭ hejma, li estis la komuna edzo de ili triope. La inoj pensis pri la semajnoj post la liberiĝo, kiam estis same. Io el la pasinteco reaperis, miksite kun bedaŭro kaj honto; sed la plejparto jam definitive pasis. Ankaŭ *Pat* ne scias, kie perdiĝis *Tom* kaj *Edward*. Li scias nur, ke *Tom* ankaŭ en Germanujo estis havinta virinojn, kaj ke *Edward* estis restinta en karceroj, ĉar li estis frapinta civilulon per revolvero sur ties kapon, tiel – kaj *Pat* donis tutan prezentadon de la maniero kiel tio okazis. “*An’ the officer said ... an’ the M.P. Said...*”⁽²⁾

La plejparton ili ne komprenis.

Vespere, ĉe enlitiĝo, ekestis eta incidento. “*Sleep*” kaj “*sliepe*”⁽³⁾ multe similas. Sed *Pat* ne tre ŝatis, ke li devas iri en la fojnejon. “*I don’t like hay*”⁽⁴⁾, li diris grumblante. Kaj krome li havis aliajn rajtojn; kaj li kaŝe rigardis al *Gjertsje*, kiu ne scias, kiel ŝi solvu ĉi tion; alterne ŝi ruĝiĝis kaj paliĝis.

Sed *Hinke* sukcesis trankviligi lin. “*Letter*”⁽⁵⁾ ŝi diris; kaj tion *Pat* komprenis, duonkonsentante.

Pat restis kaj evoluis ĝis iĝi farmlaboristo. Li helpis dum la fojnrilkolto kaj suprenigis grandajn staplojn. Li serioze aktivis. Sed post kelkaj semajnoj, kiam ili jam

alkutimiĝis unu al la aliaj kaj kiam la interkompreno jam multe pliboniĝis, li havis la ideon retroiri al Kanado. Kun la du *Gjertsje*-oj. "*To-morrow we'll go off. To-morrow morning.*"⁽⁶⁾ Kaj li kantis sian plej ŝatatan kanton: "Ho Kanado, ho Kanado!" Li havis grandajn leterojn kun stampoj de la Kanada ambasadoro.

La virinoj ne estis preparitaj je tio kaj embarasa interparolado sekvis. *Gjertsje* ja kuraĝus, ŝi diris, sed ŝi akceptus nur se tio okazus en bona amikeco. *Hinke* kaj *Durkje* ambaŭ malkonsilis tion al ŝi. *Hinke* jurpetis: "Kiu scias, kia ulo li estas. Eble li estas kolektisto de terpomŝeloj. Povas esti, ke li loĝas en loĝveturilo aŭ en distruita barko."

Tio estis vera, *Pat* ne aspektis tre sociema. Kaj *Gjertsje* sentis bone, ke la kutima kaj propra ekzisto estas grava. Ŝi ĉirkaŭrigardis: ĉi tie kuŝas ŝia juneco, ŝia feliĉo. La **PIERSMA**-farmeto kuŝis tiel agrable kaj fidodone sub altaj arboj. Ĉi tie estis tiel granda unueco interfratina, tiel granda ĝojo, etoso de intimeo. Kaj plie tiu fremda lando, tiuj fremdaj homoj, el kiuj ŝi neniun konis, kaj tiu larĝa maro, kiun ŝi devus transiri!... Tie estus la nostalgio!... Ŝi ja foje legis pri Kanado: dum tagoj vojaĝi sen unu vilaĝo. Eble ŝi neniam plu revidus ion de tio jena: nek la farmeton, nek la fratinojn, nek la fruktarbejojn, neniun. Nekonata viro, kiun ŝi apenaŭ komprenis kaj pri kiu ŝi ne sciis tion, kion li faras por vivgajni, ŝi eĉ ne scias, ĉu entute li havas domon... Sed aliflanke – li estas patro de ŝia infano, li povus kaj volus forpreni la honton, kiu jam dum jaroj mordis ŝian animon. Ĉu tiu viro ne rajtas edzinigi ŝin, eĉ estante kia li estas? Ĉu li ne estis altirinta ŝin al si, la sola, kiu en pli ol tridek jaroj deziris ŝin. Iam ŝi estis permesinta, ke li venos en ŝian liton, ŝi estis volonte konsentinta, ke li karesos kaj posedos ŝin. Ĉu ŝi ne restu apud li pro la tiama konsekvenco?

"Kaj ni do?" demandis *Hinke*. Ŝia Edward neniam revenus por forviŝi ŝian honton. Kaj ankaŭ *Durkje* de-longe perdis la esperon, precipe nun, kiam ŝi sciis tion plian pri *Tom*,

tion pri la virinoj en Germanio. "Kaj ni do?" ripetis *Hinke*. "Ni ja apartenas unu al la aliaj. Ĉu ni ne ĉion komune elportis?"

"Fakte! Estas vere" diris *Gjertsje*. Larmoj puŝis sin tra ŝiaj palpebroj. "Sed se li postulus la infanon?"

"Li unue pruvu, ke ĝi estas lia", diris *Hinke*, kiu sentis, ke ŝi estas venkanta. "Kaj tiam li kalkulu ankaŭ kun mi. Mi volus vidi, kiel li forprenos de ni la infanon. Ni ja apudas al vi. Ĉu vere aŭ ne, *Durkje*?"

"Estas vere", diris *Durkje*. "Estas bone", diris *Gjertsje*, "mi restas."

Pat ĉeestis kaj aŭskultadis. Li sentis, ke liaj ŝancoj ŝanceliĝas. Li ne volis plu petadi, okazo io ajn. Ĉu ŝi kuniros, morgaŭ matene? Jes aŭ ne?

"Ne!" La voĉo de *Gjertsje* sonis sufokite en ĉagreno, sed decide.

Tiam *Pat* koleriĝis kaj pugne bategis sur la tablon. Ĉu ŝi rifuzos? Ŝi devis kuniri. "*To-morrow we'll leave!*"⁽⁷⁾ Kaj li ĵetis la stampitajn leterojn sur la tablon.

Ĉiuj tri rigardis al *Gjertsje*; ĉu ŝi rezistos aŭ cedos? Bildoj fulmis tra ŝia kapo: longa, longa marvojaĝo, granda urbo, domo kun balkono kaj glaciŝranko, loĝveturilo... Ŝi ne sciis, ŝi ne sciis.

Tiam intervenis *Hinke*. Ŝi estis la plej juna kaj la plej akra delongtempe. Ŝi ekpostenis tuj antaŭ *Pat*:

"Mi diras jenon al vi, patroto. **GJERT** restas ĉi tie, ĉi tie ĉe ni, komprenite? Ĉe ni, vi aŭdis ja klare, ĉu ne? Ĉi tie sub ĉi tiu tegmento. Ni apartenas al ĉi tiu hejmo kaj ni restas ĉi tie. Vi jam kolektu viajn ĉifonojn kaj malaperu." Kaj ŝi montris la pordon. *Gjertsje* provis ankoraŭ iom mildigi la kazon, ŝi sentis kompaton; ne necesis tiel trudi. Homo devas ja konservi sian decon.

"*Ju kan blejben*"⁽⁸⁾ ĉi tie ĉi-nokte", ŝi diris, "kaj iri *to-morrow*."⁽⁹⁾

Pat estis konsternita sub la atako de *Hinke* kaj jesis humile. Li ĉirkaŭrigardis: ĉi tie nenio plu farendas por li.

La malamo de *Hinke* estis nuliginta lin. Sed ĉi-nokte li povis ankoraŭ resti.

"*All right*"⁽¹⁰⁾, li diris kaj grimpis en la fojnejon.

Kiam ĉio ripozis, li kaŝiris en la ĉambreton de *Durkje*. Eble ŝi volus lin konsoli nun, kiam li estis forsendita kiel hundo. Ŝi estis la plej aĝa, sed ankaŭ la plej mildanima, la plej silentema el la tri. Egale se ŝi repuŝus lin. Li prenis ĉiujn riskojn. Li kapablis bone kalkuli.

Kaj la postan matenon mankis en la **PIERSMA**-farmeto tri personoj: *Pat*, *Durkje* kaj la eta *Durkje*.

Ĉi-lasto ja ne havis negran sangon en la vejnoj, sed tio, konsidere la situacion, nepre ne estis malavantaĝo.



Verkis Frisingve **Anne WADMAN**
Alesperantigis **Sipke STUIT**

Rimarkoj:

- 1) Laŭsone la angla vorto "*merry*" (gaja) tre similas al la frisa vorto "*merje*" (ĉevalino) kaj tial kaŭzis miskomprenon.
- 2) "Kaj la oficiro diris... Kaj la Militista Policano diris".
- 3) La angla vorto "*sleep*" kaj la frisa vorto "*sleepe*" signifas "dormi" kaj sonas preskaŭ same.
- 4) "*I don't like hay*" = "Mi ne ŝatas fojnon".
- 5) La frisa vorto "*letter*" kaj la angla "*leter*" signifas ambaŭ "poste" kaj sonas preskaŭ same.
- 6) "Morgaŭ ni foriros, Morgaŭ matene."
- 7) "*To-morrow we'll leave*" = "Morgaŭ ni forvojaĝos"
- 8) "*Ju kan blejben*" = "Vi povos resti..."
- 9) *to-morrow* = morgaŭ
- 10) "*All right*" = "Ĉio en ordo".

Poemo

Libero


Pri la infanaj soldatoj,

Senditaj en la militon,
 Libero, ĉu vi tremas?
 Kiam juna kamikazo
 Jen subite sin fajrigas,
 Libero, kie vi estas?

Kiam blondaj aŭ brunaj
 Geknaboj
 Vendas sian naivecon,
 Libero, ĉu vi povas
 Elteni?
 Kiam ses milionoj
 Da animoj forflugis
 El flamoj,
 Kial do vi silentis?

Kiam oni perfortas
 Junulinon,
 Kiam familio perdas
 Tegmenton.
 Kiam hundon oni ĵetas
 Survoje dum feriadoj,
 Libero, kial vi mutas?
 Por la bestoj nomitaj
 simbole "La homaro",
 Libero, kiu vi estas?

Kaj Libero respondas:
 "Mi estas vivanta flamo,
 Mi enŝovas min en luktojn,
 El kiuj novaj printempoj
 Elŝprucos,
 El kiuj aliaj vidpunktoj
 Naskiĝos!"
 Tiam la nomo "homaro"
 Similos al mia nomo
 "Libero"...



Rose **DEBROUWÈRE**
 (Rezidejo de Saint-André)

La ĵurnalo de Cathy Peroni kaj kompanio (dua parto)

Unu tagon mi vekigis eta knabo. Mi altis ekzakte unu metron kaj kvardek-unu centimetrojn, kaj mi amis la televidajn ĵurnalistojn. Estis simpatie renkonti unu el ili en frenezulejo. Mi pasigis longan tempon kun li. Li intervjuis min, ĉar mi estis la venkinto de pluraj ŝakludaj turniroj. Mi respondis al liaj demandoj. Mi tre fieris, tial ke mi gajnis ĉiujn tiujn turnirojn. Inverse, mi ne sukcesis memori, kien mi metis mian ŝaktabulon. Tio ĉagrenis min, ĉar mi volis fari demonstron; kaj sen mia ŝaktabulo mi devas ŝajnigi la ludon, kaj tion mi ne ŝatas. Oni faras la aferojn, aŭ oni ilin ne faras!...

Tio ne estas principo. Mi havas nenian principon. Estas stultajoj la principoj. La homoj, kiuj ĉiuj diras sin normalaj, taksas inter si iujn respektindaj kaj aliajn ne respektindaj. Mi ne komprenas al kio utilas tia sinteno por ili. Kelkfoje, kvankam mi ne estas aŭguristino, mi vidas ilin delokiĝi kun krado ĉirkaŭ si. Estas strange. Tio ne ŝajnas perturbi ilin, kvazaŭ ili ĝin ne vidas.

Ĉar mi ne vidas la lokon, kie kuŝas mia ŝaktabulo, mi nenion povis demonstri, kaj mi haltigis la intervjuon, kaj mi foriris por fari knabetecajn umojn. Survoje mi renkontis mian patrinon; "Cathy, mia karulino, estas panjo" ŝi diris. Kaj mi diris "Mi volas rultabulon". Ŝi ekknedis miajn ŝultrojn. Ŝi ploris, dirante "Jes! Certe mi kunportos ĝin morgaŭ".

Estis ja afable ŝiaflanke diri tion al mi, sed tio ne interesis min. Ŝi evidente ne komprenis, ke la rultabulon mi ne bezonis nun, por ludi kun miaj gekamaradoj. Ĉar mi ne havis la rultabulon, mi rigardis ilin skatumi; ridante kiam ili falis, kio ofte okazis; eligante "Ŭaŭ!" kiam ili sukcesis realigi komplikajn figurojn. Mi intencis montri al ili kiom mi kapablas, sed neniu volis pruntedoni al mi sian aparaton.

Eksciu, ke mi ne estis ĉagrenita. Tio ofte okazas al mi, ke mi ne havos

tion, kion mi bezonus ĝustatempe; kaj mi konstatas, ke la bezono sufiĉe rapide pasas. Iam okazis sama afero. La morgaŭon – nu mi kredas, ke estis la morgaŭo, sed mi ne certas, ĉu ne? – mi estis floro. Mi ne scias kia floro mi estis, ĉar mi estis tro malgrandega por rigardi min en la spegulo.

Mi dumtage nenion faris, krom esti plantita en la grundo kaj elasi mian parfumon. Delico! Mi bonodoris, kaj estis tre agrable. Je iu momento, oni instalas min sur la fotelon, en la oficejo de la Doktoro *Nicolas DUPRE-MOBON*, por mia ĉiutaga seanco. Estis nekredible! Li estas tute ne realista, tiu kuracisto. Psikanalizi floron, kia ideo! Li parolis, li atendis, ke mi respondos, li denove parolis.

Li nomis min "Fraŭlino *PERONI*". Sincere, ĉu vi vidas la bildon?

Iu serioza psikiatro, aŭ iu kiu almenaŭ sin kredas tia, vidalvide al floro, kaj kiu eĉ ne konscias pri tio. Babilado, silento, rehabilitado, kaj tiel plu...

Li eĉ ne rimarkis, ke mi bonodoras. Kaj li pretendas povi helpi min, eĉ resanigi min! Ni preterpasu! Mi bone status sur la fotelo. Mi profitis la lumon por pleje malfermi miajn petalojn, feliĉege ridetante. Mi bezonis nenion. Neniu malagrablaĵo, neniu enuo. La sono de la vortoj alvenis al mi el la buŝo de la kuracisto kiel zumado.

La floroj havas nenium lingvaĵon, kaj sentas nenium bezonon komuniki kun la homoj; ĉu tion vi scias?

Mi estis tie, jen la tuto! Mi scivolintus kion la Doktoro *DUPRE-MOBO* ja enskribis en la dosieron, tiun tagon en la dosieron de *Cathy PERONI*.

Ne la realecon ĉiaokaze, ĉar li el ĝi nenion perceptis.

Ja! Nenion pli ol kiam mi estis la araneo de la frenezulejo. Estis dumvintre, mi opinias, ĉar estis neniu moskito kaj mi malsatis. Mi estis malpeza kiel plumo, kaj mi tre rapide antaŭeniris. Necesis diri, ke ok kruroj tre sensible plibonigas la moveblon. Mi rapide paŝadis en la frenezulejon, sur la planko, sur la muroj, sub la plafono, ekserĉante iom da nutraĵo.

Sed mi nenion trovis. Necesis, ke mi tre atentu, ĉefe kiam mi surplanke kuris, ĉar senĉese estis dikaj masoj, kiuj fortege moviĝis ĉirkaŭ mi, kaj ne avertinte min. Tiuj masoj estis la piedoj de la homoj, neniam ili priatentas ion, ĉiam ili opinias sin sole vivantaj sur la tero. Por iom ripozi, mi restis ĉe angulo de muro kaj komencis ŝpini aranejaĵon, esperante minimume kapti unu muŝon. Sed ankaŭ tiam estis kompleta malsukceso. Estis neniu videbla eta flugilparo. Mi opinias, ke mi finfine endormiĝis, ĉar mi abrupte rekonsciiĝis pro zumego.

Ĝi venis el tubo kroĉita ĉe ronda skatolo kaj movita de virino, kiu, alvenante apud min, diris: "For de ĉitie, *Cathy*, necesas, ke mi finu pasigi la polvosuĉilon". Kiel kutime mi ne tuj reagis, kaj sekve mi retroviĝis vojaĝanta en la tubo. Tio rapidis kaj tiklis min. Mi alvenis en lokon plenan de polvo. Mi provis eliri, sed mi praktike ne povis moviĝi, tiam mi reekdormetis. Tiam mi havis bonegan sonĝon. Mi estis princino kaj mi vivis en kastelo kun miaj gepatroj kaj amaso da gefratoj. Estis ankaŭ multje da servistoj, kiuj min prizorgis. Ĉiuj multe moviĝadis. La kastelo estis bele dekoraciita per fadenoj kaj pentraĵoj, ĉie. Mi estis svingiĝanta per balancilo kroĉita ĉe pendanta fadeno el granda lustru, kiam oni anoncis la manĝon. Mi resupreniris laŭlonge de la fadeno, kaj mi galopis ĝis la manĝoĉambro. Tie estis granda araneajo plenigita de muŝoj kaj moskitoj kun kelkaj akvogotoj, kiuj perlis tie kaj tie. La efekto estis superrega kaj tre apetitveka. La tuta familio impetis al la manĝo. Finfine mi estis tute sata.

Ĉi-tiu taglibro estas bonega ideo. Mi povas rakonti mian vivon en la frenezulejo, liberigite de atentemaj homoj, kiuj ne interrompas min por komenti, peti precizigojn, serĉi kion pri io opinias *Cathy PERONI*. Fakte pri tio nenion pensas *Cathy PERONI*.

Ŝi ne estas informita. Dum mi pri tio pensas multajn aferojn, neniu alia strebas scii ion. Ekzemple: kiu ĝojis

pri la ĝojo de mi konata, kiam mi ne plu havis kruron kaj brakon, kiel tervermo aŭ serpento, kiam mi neniam povis uzi la rultabulon de knabeto por pli rapide delokiĝi? Ĉu vi vere kredas, ke tio estas ne grava? Certe ne! Male tie kuŝas vera malkovro. Eble tio estas neutila; sed tio apartenas al mia vivo; tio fakte estas mia tuta vivo, ĝuste kiam tio okazas. Lasi sin gliti tra la koridoroj; vidi la homojn ĉirkaŭ mi salti por eviti min – kaj ĉefe por eviti la falon! –; konsideri ilian konsternitan mienon, kiam ili preterrenkontas min, dirante “Evidente tio ne glatas por *Cathy*”; ridi plengorĝe pro la plezuro naskita de la rapideco; kaj samtempe gracie, volupte ondadi. Tio konatindas. Pro tio mi kontentas verki tiun taglibron. Mi estis bonŝanca. Hodiaŭ matene mi estis nenio, mi estis nenio, kaj mi evoluis en tuta malpleno. La malpleno estas silenta kaj rozkolora. Tie nenio okazas kaj neniam iu ĉeestas, kvankam tien ĉiuj povas iri. Tio ne estas distanciga loko. Subite mi eliros el la malpleno, kaj mi retrovos min verkisto de taglibro. Vera ŝanco! Jes ja! Ĉar sekve al tio mi povas kontakti vin. Sufiĉas, ke mi petos paperajon kaj skribilon.

Sinjorino tuj donos ilin al mi, nomante min: “*Cathy*! Estas mirinde! Prenu tiun kajeron kaj tiun *Bic*. Mi iras informi la flegistinon!”. De kiam mi verkas tiun taglibron, ili ĉirkaŭas min kaj provas legi super mia ŭlthro, eĉ la Doktoro **DUPRE-MOBON**. Sed ili ne sukcesas, ĉar mi kaŝiĝas. Ne tial, ke tio povus esti sekreto, sed simple ĉar mi pensas, ke ili povas iom atendi ĝis mi finos. Ĝis nun neniu interesiĝis pri mi. Sed nun ili ĉiam turmentas tiun *Cathy*. Ŝi estas certe tre afabla, se ŝi ja ekzistas. Sed ĉu ŝi ekzistas? Ĉar ĉi-tie nenio estas fida. La aferoj ekestas, kaj subite malaperas. Vespere mi enlitiĝas, la morgaŭon mi vekigiĝas en nesto. Iam mi ŝatas la ĉokoladkukon, alian tagon mi malpacientiĝas, ne trovante muson por regali min. Kaj mi povas ion diri al vi: oni vidas ne same la aferojn, se oni estas birdo aŭ se oni estas kato. Iliaj interesoj en la vivo tute ne estas samaj; kaj sekve mi same reagas. Tio, kio strangas estas ke, se mi estas io ajn, mi estas ja tio, kvankam laŭdire mi ne scias, kiu mi estas. Se mi kredas la slipon de la kuracisto, mi estas *Catherine PERONI*; sed li eraras! Ne

pro tio ke oni nomas min *Catherine PERONI*; mi fakte estas *Catherine PERONI*. Cetere – ĉiam laŭ la slipo de la kuracisto, tiu persono estas freneza, do ŝi ne povas scii, kiu ŝi estas kaj ekzisti tia. Evidentas, ke mi ne estas *Catherine PERONI*, ĉar por povi ekzisti, tiu persono devas povi sin rekoni. Nu! Eĉ mi ne konas ŝin; do mi ne riskas rekoni ŝin. Ĉio ĉi evidentas. Kio ankaŭ estas evidenta, tio estas ke mi longdaŭre restados en tiu frenezulejo. Ĉar dum la Doktoro **DUPRE-MOBON** volos, ke mi estu *Catherine PERONI*; dum mia patrino asertos “*Cathy*, mia karulino, estas panjo” kaj atendos, ke mi respondu; dum ili ne konsentos, ke “Nu! Vi!” estas nomo, kiu tre bone taŭgas al mi; ili daŭre volos zorgi pri mi. Cetere tio ne ĝenas min. Tute ne! Mi sentas min ĉi-tie tre bone en frenezulejo. Kaj vi? “*But the fool on the hill sees the sun going down and the eyes in his head see the world spinning around*” – **The fool on the hill – THE BEATLES.**

Fino de la dua, lasta parto
Alesperantigita de *Jean DIETRICH*

El la redakcio Atentigo de la redaktoro

Redaktonte mian tradician “Atentigan rubrikon”, mi estas ĵus rete informita de iu leganto, pri la internacia SAT-kongreso okazonta ĉi-jare en Francio en *Dinant*, je ne precizigita dato.

Mi ne dubas, ke inter la Nordfederacianoj, legantoj de nia “Norda Gazeto”, estos iu membro – aŭ nemembro – de SAT, kiu partoprenos tiun kongreson, kaj kiu sendos al mi raporton kaj komentojn pri tiu eminenta evento.

Estas ja memkompreneble, ke nia revuo respegulu ĉiujn esperantistajn lokajn, regionajn, naciajn, internaciajn travivaĵojn de niaj legantoj, kaj ne nur de niaj lokaj gazetkorespondantoj.

Samkiale mi memorigas al vi, ke ĉiuj

legantoj de nia gazeto estas ankaŭ ĝiaj redaktoroj. Tial mi ĉiam ricevos kun plezuro kaj atento viajn komentojn, viajn kritikojn kaj viajn artikolojn (originalaĵojn aŭ tradukaĵojn) kun viaj fotoĵoj...

Alvenas nun la somero kaj la periodo de la libertempoj. Mi deziras al vi agrablajn sunplenajn feriojn, en familio, ĉu en Francio ĉu aliloke. Sed poste rekomenciĝas la nova lernojar, en viaj urboj kaj vilaĝoj, principe laŭ la nova sistemo de “Eksterprogramaj aktivaĵoj” (*Activités périscolaires*), deciditaj de la ministerio pri instruado.

Mi esperas, ke multaj el niaj legantoj enskribiĝos al sia baza lernejo, por gvidi – al *CM1-CM2* – inicajn lecionojn de Esperanto. Tio estu korelativa

agado kun la nuna agado farita al la ministerio pri instruado por “*Espéranto au Bac*” de *Espéranto-France* kaj SAT-amikaro.

Memoru ankaŭ, ke ni bezonas volontulojn por diversaj helpoj kaj deĵoradoj dum la venontjara Universala Kongreso en Lillo. Sciigu viajn eventualan bonvoleman pretecon al via grupestro, kiu informos la LKK-on de la kongreso.

Por fini tiun “Atentigon de la redaktoro”, mi volas adresi miajn dankojn kaj gratulojn al ĉiuj federacianoj, kiuj fluigas al mi informojn kaj artikolojn.

Same mi dankas kaj gratulas al: *Pascal V.*, nia kompetentega korektanto; al *Cyrille D.*, nia eminenta enpaĝ-

iganto; al *Richard V.* kaj al *France V.*, efikaj verkantoj de la "Suplemento por komencantoj" kun *Jean-Marc F.* kaj enpoŝtigantoj de la gazetoj; kaj al ĉiuj grupaj responsuloj kaj korespondantoj, atentemaj informantoj de niaj kolumnoj.

Persone, mi konfirmas tion, kion mi sciigis okaze de nia lasta komitata kunsido. Mi intencas daŭrigi mian mision de ĉefredaktoro ĝis la eldono de nia gazeto je Junio 2015 antaŭ la Universala Kongreso. Poste mi ekŝigos el mia nuna posteno. Tiam mi estos 84-jara kaj mi deziras iom

ripozigi miajn mensajn kaj fizikajn fortojn.

Ekde nun mi petas, ke sin prezentu al nia federacia estraro volontulo por repreni la torĉon de la "Norda Gazeto"...

Claude LONGUE-ÉPÉE

Programo 2014 de la Esperanto-kastelo Greziljono



29a de Junio – 6a Julio 2014

Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj.

Rete: www.gresillon.org/s2

1a-9a de Aŭgusto 2014

Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso.

Rete: www.gresillon.org/s3

9a-17a de Aŭgusto 2014

Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto.

Rete: www.gresillon.org/s4

24a de Okt. – 1a Nov. 2014

AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

Adreso: MCE Grésillon

Saint-Martin d'Arcé

49150 BAUGÉ-EN-ANJOU France

Telefono: +33 (0)2 41 89 10 34

Retpoŝto: kastelo@gresillon.org

Retejo: www.gresillon.org

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD

Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Michel DECHY

65 Allée Crémaillère

59650 VILLENEUVE-D'ASCQ

Tel : 06 16 98 41 02

mdechy@esperanto-nord.org

Sekretario:

Katja BOEN

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

cboen@esperanto-nord.org

Kasisto:

Xavier VILAIN

Résidence L'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 DUNKERQUE

Tel. 06 70 65 93 29

xvilain@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordo de "Fédération Espéranto-Nord" sendota al la kasisto.

BULTENO "NORDA GAZETO"

Ĉefredaktoro:

Claude LONGUE-ÉPÉE

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

plongueep@free.fr

Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

Konstantaj korespondantoj:

★ Amiens

Cyrille DÉCOUTURE

kontakt@esperanto80.org

★ Arras

Edmond PLUTNIAK

edmond.plutniak@free.fr

★ Boulogne

Marie-Jeanne LINÉ

mjline@esperanto-nord.org

★ Dunkerque

Elise DEPLA

edepla@yahoo.fr

★ Lille-Villeneuve

Katja BOEN

cboen@esperanto-nord.org

★ Valenciennes

Jean-Marc FRATARD

jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille DÉCOUTURE

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

kontakt@esperanto80.org

Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude LONGUE-ÉPÉE

plongueep@free.fr

Pascal VILAIN

p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard VALET

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

rf.valet@wanadoo.fr

La teksto de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Aŭgusto 2014.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Arllette kaj Edmond PLUTNIAK, Claude LONGUE-ÉPÉE, Cyrille DÉCOUTURE, Elise DEPLA, Michel DECHY, Katja BOEN, Jean-Marc FRATARD, Roland PLATTEAU, Jean DIETRICH, Rose DEBROUWÈRE, Sipke STUIT, France VALET, Guy PERRIN, Marie-Jeanne LINÉ.